

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

TEJO en Monda Forumo
Esperanto en bibliografio
Daŝgupto: E-o kiel prilingvo

Tonkin pri la strategio de UEA

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA:
Al nova internacia lingva ordo (LEE Chong-Yeong)
- 2 Strategio por UEA: niaj celoj (Humphrey Tonkin)
- 4 Informado: Pluaj ago-tag-eroj
- 5 Fondaĵoj: Espero malgraŭ ĉio (Renato Corsetti)
Eksteraj rilatoj: Kian dulingvismon? (Renée Triolle)
- 6 Junularo: Sep vizaĝoj en monda forumo (Joseph Truong);
Lingva misreĝimo (Nóra Csiszár); TEJO promociiĝis en Gvidan
Konsilion (Anna M. Ritamäki); TEJO seminariis kun skoltaj
(Renato Petrovič, Ewa Krach); Junularaj forumoj
- 8 Azio: Prezenti kaj ĝui E-kulturon (Joel Brozovsky)
Lingvo: Kurba mispaŝo de Zamenhof (Bernard Golden)
- 9 Reagoj
- 10 Esperantologio: Kion instruas 5000 bibliografieroj?
(Humphrey Tonkin)
- 12 Recenzoj: *La aĵoj kaj la sezonoj* (Gonçalo Neves); *Panoramo de
la novaj au universalaj alfabetoj kaj ortografio por la Zamenhofa
lingvo* (Rikardo Cash); *La nuda feino kaj La ludanta lumo*
(Derek Roff); *SEJM. Historia skizo* (Andy Künzli)
- 13 Foliume
- 14 Recenzoj: *Historio de la ciferoj*; *Katarismo kaj naskiĝo de Inkvizicio*;
La mortotuko de Torino, la nebla objekto (Jorge Camacho);
Konciza gramatiko de Volapuko (Antonio Valén)
- 15 Laste aperis
- 16 Forumo: Propono: Kerna Esperanto, pluraj aplikoj (Probal Daŝgupto)
- 17 Loke – Fake
- 18 Str-angulo: Ermito pro milito
- 20 Nekrologoj; Oficiala Informilo

Vi trovos

la eks-prezidanton de UEA, Humphrey Tonkin, aparte fekunda kontribuanto de *Esperanto* komence de la nova jaro. Fakte okazis ke universitata libertempo ebligis al li verki por nia revuo eĉ tri longajn kaj interesajn artikolojn, el kiuj du aperas jam ĉi-numere. Temas pri resumo de spertoj kiel bibliografo pri Esperantaj lingvo kaj literaturo (p. 10-11) kaj, precipe, pri relanĉo de la strategia debato (p. 2-3), uverturo al la diskuto pri tiu "Kampanjo 2000" por nova internacia lingva ordo kiun prezidanto LEE Chong-Yeong mencias en sia novjara saluto. Ĉi-teme kun originalaj ideoj kaj stilo kontribuas Probal Daŝgupto (p. 16), kiu vidas pluajn aplikojn por Esperanto en novaj kampoj.

Konstantan re-lanĉon bezonas ankaŭ unu el la plej subtenindaj fondaĵoj de UEA, Konto Espero, ĉar la bezono por la helpo donebla per ĝi superas eĉ la grandanimecon de ĉiuj kiuj donacas por ĝi ian sumon (p. 5). Antaŭ, dum kaj post la Internacia Semajno de Amikeco (17-23 februaro) pensu pri tiuj samideanoj kiuj bonvenigos viajn salutvortojn kaj vian helpon.

La kovrilo: Humphrey Tonkin en Roterdamo (1985).

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktotino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2000, 1/2 p. 1100, 1/4 p. 600, 1/8 p. 330, 1/16 p. 180. Movada rabato 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuj ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ✉+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98; ✉+39-6-39-72-61-69; ☐mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ✉+31-50-3613763 [of]; ☐a.f.de.geus@td.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282; ✉+1-613-565-9279; ☐mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ✉+370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉+972-2-658-4437 [of]; ☐amri@vms.huji.ac.il.

Al nova internacia lingva ordo

La jaro 1996 estis vere fruktoplana. La 81-a UK en Prago, kiu amasigis 3000 esperantistojn, benita de salutmesaĝoj de i.a. prezidento Václav Havel kaj ĝenerala sekretario Boutros Boutros-Ghali, estis ankaŭ kvalite unu el la plej sukcesaj kongresoj. Per la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj pri “Lingvo por internaciaj paco kaj demokratio” ni malfermis UK-on al influhavaj ne-esperantistoj, altirante atenton de interŝtataj organizaĵoj kaj internacie konataj fakuloj pri lingva politiko. La “Manifesto de Prago de la movado por la internacia lingvo Esperanto” rikoltis subskribojn de miloj da esperantistoj. Krom Esperanto-revuoj, ankaŭ multaj nacilingvaj gazetoj ĝin publikigis.

UEA bonvenigis du novajn landajn asociojn: la vjetnaman kaj bharatan. Por la deka sinsekva jaro la nombro de individuaj membroj de UEA superis 7000. La membro-nombro de Societo Zamenhof konservis la altan nivelon kiun ĝi atingis en 1995. Nia junularo registris rekordojn: la abonantaro de *Kontakto* superis 2000 kaj la Patronoj de TEJO unuafoje nombris pli ol 100.

Ni eniru la novan jaron kun nova espero pri “Nova Internacia Lingva Ordo”. La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj malpermesas diskriminacion surbaze de i.a. lingvo. La nuna internacia lingva ordo tamen ne nur ne kapablas solvi la malboniĝantajn lingvajn problemojn sed, male, akcelas malprogreson. Nek tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progreso de la komunikada tekniko, nek malkovro de novaj metodoj de lingvoinstruado aŭ tradukado turnos tiun tendencon.

La mondo bezonas novan lingvan ordon, kun neŭtrala lingva fundamento sur kiu la diversaj gentoj povu pace kaj frate interkomunikiĝi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn. La pli justa lingva ordo celas unuecon en diverseco, tiel ke la lingva diverseco ne dividos popolojn sed unuigos ilin.

La Manifesto de Prago kaj la kongresa rezolucio de la 81-a UK invitis ĉiujn internaciajn organizaĵojn kaj lingvopolitikajn instancojn kunlabori kun la Esperanto-movado por la konstruado de “pli justa kaj demokratia lingva ordo”. Nia Komitato alvokis la landajn kaj fakajn Esperanto-asociojn pretiĝi al intensaj fortostreĉoj por komune antaŭenporti la internacian lingvon al tiu pli firma pozicio en la mondo dum la venonta jarcento kiun “Esperanto meritas kaj kiu ŝajnas nun atingebla”.

Tiu alvoko donas la direkton al nia agado en la nova jaro. En februaro UEA ekaktivis en Novjorko por persvadi Unuiĝintajn Naciojn diskuti la demandon de internacia helplingvo. En aprilo ni lanĉos similan pledon ĉe membroj de Eŭropa Parlamento. La plej praktika kaj populare akceptebla valoro de Esperanto estas ĝia utilo por la lernado de fremdaj lingvoj. Por interŝanĝi spertojn kaj pli bone kunordigi niajn klopodojn por pruvi la propedeŭtikan valoron de Esperanto, UEA kunlabore kun ILEI planas okazigi specialan seminarion kadre de la 82-a UK en Adelajdo. Ni klopodos okazigi similan diskuton ankaŭ en Eŭropo.


Por ke tiuj strebadoj estu efikaj, necesas ĝenerala plivigliĝo kaj aktiviĝo de nia tuta movado. Necesas levi ĝian idean kaj organizan nivelon. Tiucele la Komitato de UEA komisiis grupon de aktivuloj verki bazan dokumenton pri “Kampanjo 2000 por Nova Internacia Lingva Ordo”. La Komitato diskutos ĝin en sia kunsido en Adelajdo. Nura decido de la Komitato tamen ne plivigliĝos la movadon. Necesos propra iniciatemo de ĉiu klubo kaj asocio kaj de ĉiu unuopulo. Sen tio ankaŭ klopodoj ĉe UN, EU kaj aliloke restos vanaj.

Okaze de la novjaro mi speciale apelacias por subteno al TEJO, nia estonteco, kiu en 1996 atingis fierindajn sukcesojn: ĝi elektiĝis al la Gvida Konsilio de la Junulara Fakto de Konsilio de Eŭropo, TEJO-ano fariĝis prezidanto de la Eŭropa Kunordiga Buroo de Internaciaj Junularaj Organizaĵoj, kaj sep TEJO-anoj ĉeestis en Junulara Forumo de UN. Tia laboro meritas subtenon. Do, fariĝu ankaŭ vi Patrono de TEJO aŭ abonu *Kontakto*! Subtenu ankaŭ Fondaĵon Canuto, por helpi al esperantistoj de landoj kun ekonomiaj malfaciloj fariĝi membroj de UEA kaj tiel senti veran apartenon al nia tutmonda movado!

La jaro 1997 restos memorinda en la historio de Esperanto, ĉar unuafoje ni kongresos en Aŭstralio. Ni iru, vidu kaj konvinku la novan kontinenton!

Mi kaj la Estraro de UEA deziras plej feliĉan kaj prosperan novan jaron al la membroj de UEA, al ĉiuj gesamideanoj kaj al ĉies familio!

LEE Chong-Yeong



Ni danke kaj elkore
reciprokas viajn
jarfinajn bondezirojn.


Strategio por UEA:

Malgraŭ diskutoj pri strategio en la pasintaj jaroj, UEA nuntempe laboras esence sen strategia plano ĝenerale akceptita. Prezidinto Humphrey Tonkin demandas sin en du artikoloj (la venonta aperos en februaro) kion do UEA celas kaj celu, kaj kia plano helpu ĝin alstrebi ilin.

Kiel taŭgas en internacia socio motivata de idealoj, la debato pri la celoj kaj direktoj de la Esperanto-movado daŭras jam de la komenco de la lingvo. Ĝi varias de epoko al epoko. En la fruaj jaroj, tiu debato ja minacis la estontecon de la movado mem, ĉar unuflanke staris la praktikaj utiligantoj de la lingvo, kiuj volis enkonduki Esperanton en sciencon kaj komercon kaj pretis ŝanĝi la lingvon mem se necese, dum ĉe la alia flanko staris tiuj kiuj kredis je la idealoj malantaŭ la pacama kaj ekumeneca filozofio de la iniciatinto de la lingvo kaj insistis pri fideleco ne nur al liaj ideoj sed ankaŭ al liaj lingviformoj. Ne povante fleksiĝi, la Esperanto-movado splitiĝis, kaj la idistoj iris sian vojon. En la jaroj post la dua mondmilito, la ĉefa debatopunkto rilatis al la politika neŭtraleco kaj la klopodoj de granda parto de la movado trovi vojon por teni politike dividitajn mondopartojn kune en la kadro de neŭtrala Universala Esperanto-Asocio. Dum tiu periodo, kaj malgraŭ la diversaj agadoj ekster ĝia sino, multaj homoj konsideris UEA ne nur la ĉefa motoro de la Esperanto-movado sed preskaŭ identa kun ĝi: laŭ la tiama interpreto, kio bonis por UEA bonis por Esperanto.

Hodiaŭ la kerno de la debato rilatas al la strukturoj de la Esperanto-komunumo kaj la utiligo de la lingvo. Unuflanke staras tiuj kiuj kredas je la tradiciaj strukturoj: tegmenta internacia organizaĵo, landaj kaj fakaj asocioj laborantaj ĉiu sur sia tereno, kaj la diversaj lokaj strukturoj sub tio. La homoj kiuj kredas je tiu vertikala strukturo emas kredi ankaŭ je la valoro kaj la kapablo de internaciaj registaraj organizaĵoj. Sekve ili emas paroli pri la graveco konvinki Unuiĝintajn Naciojn rekoni kaj utiligi Esperanton, kaj ili ĝenerale deziras vendi siajn varojn al eksteruloj, argumentante ke Esperanto povas utili al la cetera mondo. Tiuj homoj emas konsideri la Esperanto-komunumon movado, kiu celas atingi ion ne jam atingitan, nome la pli ĝeneralan utiligon de Esperanto por praktikaj celoj ene de ekzistantaj instituciaj strukturoj.

Dua tendaro argumentas ke Esperanto jam havas sian praktikan utilon, nome ke homoj kiuj deziras utiligi ĝin havas ĝin je sia dispono kaj povas efike komunikiĝi internacie. Iam oni bezonis internaciajn organizaĵojn por kontaktigi la parolantojn de Esperanto: sen Jarlibro la esperantisto de 1950 estis perdita; sen abono al *Heroldo* ne eblis elturniĝi. Hodiaŭ, tamen, la elektronika revolucio malfermis la komunikkanalojn al homoj kun similaj intereso: ekzistas plej diversaj kaj tre efikaj vojoj por trovi



Humphrey Tonkin dum la 74-a UK (Brajtono, 1989), kie la Komitato diskutis (tro malmulte) pri Strategia Plano por UEA.

tiujn kun kiuj oni deziras rilati per Esperanto. Ne necesas vertikalaj strukturoj – kaj la komunumo kreskos, se entute ĝi kreskos, per la simpla utiligo de la lingvo. Tiuj personoj prenas kiel gvidan principon la difinon de iuj lingvistoj ke la Esperanto-komunumo estas lingva socio, eĉ kun trajtoj de diaspora lingva minoritato simila al aliaj minoritatoj lingvaj.

Ekspluatantoj kaj naivuloj

La homoj el la dua tendaro emas nomi tiujn de la unua tendaro “finvenkistoj,” kiuj laboras vane por la ĝenerala disvastiĝo de Esperanto. Tiuj en la unua tendaro frustrigas ne pro manko de la tiel nomata Fina Venko, sed pro tio ke tiuj en la dua tendaro ŝajne rifuzas veni al iliaj kunvenoj, rifuzas pagi siajn kotizojn, kaj sen sento de devigo ekspluatas la lingvon por propraj celoj. Unu flanko parolas pri ekspluatantoj, dum la alia flanko parolas pri naivuloj.

En plej vasta senco ambaŭ flankoj pravas. Komunikaj kaj organizaj strukturoj en la mondo profunde kaj signife ŝanĝiĝis. Tiuj ŝanĝoj igas nenecesaj multajn vertikalajn strukturojn de antaŭaj epokoj. En tia mondo ne havas senco mezuri la sukceson de Esperanto surbaze de la membronombro de UEA: amaso da aktivuloj apenaŭ rilatas entute al UEA aŭ SAT aŭ aliaj formalaj internaciaj Esperanto-asocioj, sed agadas ekster ties kadroj.

La unua flanko nomus tian sendependan interrilaton manko de disciplino, dum la alia flanko ĝin nomus libereco. Flanke de UEA, neniuj niaj strategio sukcesos kiu ne prenos en konsideron la fakton ke la fenomeno Esperanto ja estas ne nur movado sed ankaŭ kaj fundamente socio aŭ parolkomunumo. Sekve UEA devas demandi sin kiel ĝi influu tiun vastan kaj interligitan reton da agadoj por atingi siajn celojn.

Kaj kiuj estas tiuj celoj? Nia Statuto nomas kvar:

“(a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto;

(b) agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon;

niaj celoj



(c) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo;

(d) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.”

Notu ke nur la dua povus iel ajn esti nomata “finvenkismo.” Ĝenerale la gvidantoj de UEA ne prezentas kiel la celon de UEA la forigon, unufoje por ĉiam, de lingvaj baroj inter la nacioj. Estus bele se tio okazus, sed nia celo estas pli modesta: “agadi por” la solvado de lingvaj problemoj kaj “faciligi” la komunikadon internacie. Tiu estas laŭgrada procedo, kiu ne estas bazita sur espero je subita kaj utopiista konvertiĝo de la homaro, nek ligita al iu revo je kompletiĝo de tiu procedo. Aliflanke, atentigi internaciajn organizaĵojn ke ni povas proponi praktikan solvon por specifa problemo, aŭ konvinki edukajn instancojn ke Esperanto estas utila studobjekto en la lernejoj, tio estas nenio alia ol deziro ke Esperanto estu aplikata al la celo krei pli justan kaj pli bonan socian ordon.

Nia Asocio ankaŭ havas respondecon, laŭ sia unua celo, faciligi la utiligon de Esperanto. Tio signifas ke ne nur ni ne bremsu iniciatojn ekster UEA, sed ke ni aktive helpu krei kondiĉojn en kiuj tiuj iniciatoj povas okazi. Nia funkcio estas roli kiel faciligilo kaj vastigilo de la komunika reto inter la uzantoj de Esperanto, tiel ke tiuj uzantoj maksimume profitu el sia uzo de la lingvo, kaj pliaj uzantoj eniru la reton. En tiu kunteksto, kongresoj, libroservo ktp estas nur rimedoj en pli vasta celo de komunikado.

La tria celo donas al ni iom specifan funkcion, nome alfronti la tradiciajn barilojn inter la homoj, atribueblajn ne nur al lingvaj sed ankaŭ al aliaj diferencoj. Tiu celo taskas al ni ĝuste okupiĝi pri la plej malfacilaj kontaktpunktoj. La kvara celo reemfazas tiun saman senton, kaj alvokas al profunda kompreno de la diferencoj kiuj dividas la homaron.

Ofte oni parolis kaj parolas pri ŝanĝo de la celoj de la Asocio, sed mi estas konvinkita ke tiuj celoj, kiuj restas en

kelkaj esencaj elementoj neŝanĝitaj de post la fondiĝo de la Asocio, estas ĝustaj kaj gravaj. Ili estas nek nerealismaj, kiel emas foje diri niaj kritikantoj, nek ĉioenhavaj, kiel ni mem foje emas supozi. UEA kaj la Esperanto-socio ne estas sinonimoj: UEA estas mekanismo por igi la ĝeneralan Esperanto-socion pli funkciokapabla, pli viva, pli fleksebla kaj pli granda.

Se efektive la fenomeno Esperanto estas tuta socio, tio implicas ke Esperanto estas uzata pro plej diversaj kialoj kaj kun plej diversaj celoj. Neniu gvidanto havas finan respondecon; neniu estraro regas. Temas precize ne pri Esperanto-movado, sed pri Esperanto-fakto. Oni ne povas aŭtomate supozi ke iu ajn en tiu socio akceptos respondecon pri ĝia pligrandigo. Male, oni de tempo al tempo trovos personojn kiuj estas tute kontentaj pri la nuna amplekso de la Esperanto-socio, eble eĉ ĝuas ĝian ekskluzivecon. En Usono en la lastaj jaroj ekestis Klingona movado: homoj kunvenas somere por lerni kaj utiligi la plene imagitan Klingonan lingvon, kiu originas el la sciencfikcia televida programo *Star Trek* (“Stelmigro”). Ankaŭ ni havas niajn stelmigrantojn, kiuj lernas Esperanton ĉar ĝi estas amuza flankokupo kaj fermita, sekreta mondo. Mi ne kontraŭas tiujn lingvoludantojn esperantistajn, ĉar per la simpla uzo de la lingvo ili plivastigas kaj fortikigas ĝin, sed ni konsciu ke la celoj de UEA kaj la celoj de tiuj uzantoj ne koincidas.

Falsa sento de persekutiĝo

Same, tiuj kiuj konsideras la Esperanto-socion unu minoritata komunumo inter ĉiuj aliaj, eventuale ludas je falsa sento de persekutiĝo kaj subpremiĝo, kvazaŭ esti ano de minoritato estus amuza maniero suferi (sed ne tro), kaj senti sin persekutata estus vojo por eviti la kulposenton kiu akompanas modernan ekonomian aŭ socian privilegion. Tiu maniero alfronti la mondon eventuale atribuas al Esperanto pli da graveco ol ĝi efektive havas. Tiun ludon, siavice, ni bone konas: ĝiaj karakterizoj estas troblovo de kontaktoj kun “ eminentaj ” eksteruloj, troigo de la graveco kaj forteco de niaj institucioj kaj prezentado de malgrandaj laŭŝtupaj progresoj kvazaŭ temus pri brila kaj definitiva trabato de la opozicio aŭ indiferento al Esperanto.

Mi ne vidas grandan diferencon inter finvenkismo, kiu aroge supozigas ke ni posedas la ŝlosilon al la monda harmonio, kaj persekutismo, kiu aroge supozigas ke la mondo interesiĝas aktive persekuti kaj subpremi nin. La finvenkistoj krias: “Atentu nin, ĉar ni kondukos vin al saviĝo”. La persekutistoj diras: “Mortpafu nin, ĉar ni estas efektive plene evoluinta minaco al via privilegiita vivmaniero”. Unue necesas tiel kreskigi nian socion ke ni merite ricevu la atenton de eksteruloj kaj mem havu klaran senton de niaj propraj sociaj apartecoj kaj karakterizoj. Krome, necesas sufiĉe optimisti en tiu tasko, por ne fali en tiun meta-defetismon de kredo je artefarita lingva minoritato, kun ties artefarita sento de persekuto (psike konvena ujo por loki nian frustrigon pri alies rifuzo lerni la lingvon...). Nia granda malamiko ne estas antaŭjuĝoj aŭ kontraŭstaro, sed indiferento.

Humphrey Tonkin
Office of the President
University of Hartford
West Hartford, CT 06117, Usono

Pluaj ago-tag-eroj

Jen raportoj pri diverslanda aktivado dum kaj ĉirkaŭ la Ago-Tago (5 okt.), kiuj ne atingis nin ĝis la lasta redaktofino aŭ ne trovis lokon en la decembra numero.

Aŭstrio: Leterkampanjo

Aŭstria Esperantista Federacio unuafoje kunagis en la Ago-Tago. Anstataŭ granda strata manifestacio, kutima en movade pli fortaj landoj, AEF direktis informkampanjon al la gazetaro. La temo de la informletero ligiĝis al la tiutempa EU-balotkampanjo en Aŭstrio: la lingva problemaro en Eŭropa Unio. (*Evento*)

Italio: Dialogoj en Padovo

Ĉe urbocentra stando, E-grupanoj en Padovo dialogis la tutan tagon kun interesatoj. Loka gazeto raportis. (*L'Esperanto*)

Malfreue pro burokrataĵoj ĉe la urba administrejo, la 16-an de novembro (!) ankaŭ en Milano okazis Ago-Tago: videblis surtabla ekspozicio en centra placo. (E. Rodari)



Finnlando: Teatro taŭga temo

Kvar teatrece kostumitaj aninoj de Turkua E-Societo staris de la 10-a horo en urbocentra komerca kvartalo ĉe stando sub la slogano "100 jaroj da Esperanto-teatro". Gejunuloj baldaŭ demandis: "Kiam vi komencos?" Anstataŭ teatrumi, ili tamen disdonis informilojn al dezirantoj, kiuj multnombriis pro apuda mod-prezentado. La gazeto *Turun Sanomat* anticipe informis pri tiu aranĝo la 27-an de sept., rakontante pri la historio de la E-teatro. De maldekstre: Anja Launiainen ("Liisa" el *Fervojo* de J. Aho); Leila Laineoja ("La respektama p..." de Sartre); Toini Oittinen ("Avinjo" el "Ruĝa Ĉapeto" de Grimm), kaj Anna-Liisa Ali-Simola (egiptino). (A-L. Ali-Simola)

Rusio: De Moskvo ĝis Jakutio

La 4-an de oktobro tri estraranoj de Rusia E-ista Unio (N. Gudskov, M. Ĉertilov kaj V. Aroloviĉ) respondis ĵurnalistajn demandojn en gazetara konferenco pri "E-movado kaj batalo kontraŭ malriĉeco", ĉe Rusia Pacdefenda Komitato. Rezultis en la sama vespero 12-minuta radia elsendo pri Esperanto en la ĉefa tutrusia programo, kaj estis aperontaj artikoloj en "Instruista gazeto" kaj la revuo "Rusio". La granda rusia informagentejo Interfaks ricevis sciigon pri la Ago-Tago. La 5-an de oktobro junaj e-istoj, ĉefe el la klubo MASI sub la gvido de I. Gonĉarova, disdonadis ĉe metrostacioj flugfoliojn kun atentokaptaj tekstoj. (N. Gudskov, M. Ĉertilov)

En Jekaterinburgo koncerto de Mikaelo Bronŝtejn igis urban radiostacion prepari programon pri E-o, kun intervjuo de Halina Gorecka. Grandan kaj pozitivan artikolon aperigis urba semajngazeto, kies kunlaboranto vizitis elementan kurson kaj uzis la rusan varianton de dosiero por ĵurnalistoj kiun kompilis Stefan Maul.

En Ijevsk (Udmurtio) Bronislav Ĉupin prelegis pri E-o kaj E-organizo en la klubo de lokaj ĵurnalistoj.

En la urbo Tommot de la respubliko Sahao (Jakutio) E-klubo sendis publikan leteron pri Esperanto kaj la neceso de ties instruado al la prezidento, la kulturministro kaj aliaj aŭtoritatoj. (*Ruslanda Esperantisto*)

Slovenio: Pipi Ŝtrumpolonga

La landa televido raportis la 13-an de okt. pri gastado de infana programo de la Zagreba E-societo "Bude Borjan" en festivalo de Pipi Ŝtrumpolonga (20-29 sept., Velenje).

Ukrainio: Vigla Verdaĵo

La junulara E-klubo Verdaĵo en Odeso starigis standon sur la ĉefa strato. Dum sonis E-kantoj el magnetofono, gejunuloj en E-ĉapeletoj, kun insignoj kaj UK-ŝildoj, disdonis kelkcent informfoliojn pri E-o kaj la klubo, precipe al gejunuloj. En du ĉefaj urbaj gazetoj, en radio kaj televido aperis informoj pri la Ago-Tago.

La vigla klubo Verdaĵo planas organizi internacian ekologian junularan tendaron en aŭgusto 1997. Pluaj informoj: Tatjana Aŭderskaja, p/a Kravĉenko, krav@te.net.ua. ★

KOREKTISTO SERĈATA!

La redaktoroj de la revuo *Language Problems and Language Planning* serĉas kompetentan, profesinivelan finkontrolanton de manuskriptoj, kiu kontraŭ financa kompenso pretigu la manuskriptojn por kompostado, korektante ĉiujn stilajn kaj lingvajn detalojn. Bona scio de la lingvoj plej uzataj en la revuo (angla, franca, Esperanta) estas forte dezirinda. Akurateco kaj atento al detaloj nepre necesas, same ankaŭ la kapablo facile rilati kun la redaktoroj, la kompostisto, kaj, se necese, la aŭtoroj. Turnu vin per simpla letero al la ĝenerala direktoro, Osmo Buller (adreso en la kolofono).

Espero malgraŭ ĉio

"Kio okazis al la Kabula esperantisto kiu antaŭ kelkaj jaroj volis tre fervore disvastigi Esperanton en Afganiŝtano?"

Tion mi pensis dum la televidaĵo novaĵoj rakontis pri la konkero de Kabulo fare de la armeo de la "islamaj studentoj". Bedaŭrinde ne estas eble scii, kaj ne estas eble helpi lin.

Da tiaj kazoj prezentiĝas multaj ĉiutage en ĉi tiu nia freneziga mondo, kiu malgraŭ ĉiuj miraklaj interretoj ĉefe remalkovris perforton kaj uzas la glavon sangon soifantan preskaŭ en ĉiu kontinento.

De tempo al tempo, tamen, oni sukcesas ekscii kaj interveni. En la lastaj jaroj Konto Espero de Universala Esperanto-Asocio helpis ĉefe militviktimojn en ĉiuj partoj de la eksa Jugoslavujo; danke, cetere, al la tre bonaj rilatoj inter kroataj, serbaj kaj bosnaj esperantistoj, rilatoj kiuj restis nedifektitaj de la milito.

Nun nia atento estas altirata de aliaj mondopartoj en kiuj okazas ne malpli kruelaj agoj. Multaj afrikaj esperantistoj loĝas en tendaroj por rifuĝintoj, kaj bezonas ĉian helpon. Ni provas,



ne ĉiam sukcese, akiri informojn pri esperantistaj viktimoj en centraziaj respublikoj, ni provas elspuri rifuĝintojn kiuj sukcesis atingi Eŭropon

aŭ Nordan Amerikon el militantaj regionoj. Ĉi tiu helpo estis ebla nur danke al la centoj da esperantistoj kiuj malavare donacis al Konto Espero, kaj tiel praktike pruvis ke solidareco ne estas nur retorika vorto en la Statuto de UEA.

Eventuale ni devos akiri konsultajn rilatojn ankaŭ kun la Alta Komisaro por Rifuĝintoj de Unuiĝintaj Nacioj,

kies revuo estas la plej atente legata publikigaĵo inter la centoj kiujn produktas la agentejoj de la UN-familio.

Bedaŭrinde mi ne povas diri: "Ĉesu sendi viajn donacojn al Konto Espero". Eĉ male, mi devas diri: "Bonvolu plu sendi", ĉar la muroj de miljaroj ankoraŭ forte staras. Ni esperas detrui ilin per nia diligenta laborado — sed intertempe ni devas helpi e-istajn viktimojn

tra la tuta mondo, kaj ni povas fari tion nur danke al via subteno.

*Renato Corsetti (Italio)
Lanĉinto de Konto Espero*

EKSTERAJ RILATOJ

Kian dulingvismon?

Kolokvon kun tiu titolo (Parizo, 18-19 okt.) ĉeestis 130 homoj, ĉefe instruistoj en internaciaj aŭ eŭropaj lernejoj, famaj lingvistoj, respondeculoj de diversaj movadoj por dulingveco, kaj manpleno da industriuloj.

Ĉiu akordiĝis pri la fakto ke dulingveco estas grava helpo en la konstruo de la infana personeco, ke indas komenci tre juna, je la tria vivojaro, kiam infano alproprigas novan kodon, aŭ je la sepa jaro, kiam li ekvizitas lernejon. Alia komuna pripenso estis ke lingvo ne devas esti fako en si mem, sed prefere perilo, rimedo por instrui ion alian.

Konsternaj estis la statistikoj pri lingvoinstruado en Eŭropo: ju pli da lingvo, des pli da angla! En Germanio, devige 100% de la lernantoj lernas la

anglan, kaj nur 40% alian lingvon; en Francio 95% (laŭ aliaj, 98%) lernas la anglan, kaj la cetero distribuas inter si la lernadon de 21 aliaj lingvoj. En Hispanio 90% lernas la anglan, 9% la francan, kaj 1% la germanan, portugalan aŭ italan.

Kiel reagis la ĉeestantoj? Ili konsterniĝis (ĉefe pro la malapero de la franca), plendis, bedaŭris, sed ankoraŭ ne pretis serĉi solvon. Al rimarkigo de la prezidanto de la eŭropaj lernejoj, kiu "volus ke Esperanto malaperu", mi rajtis respondi kiel vicprezidanto

de UEA, argumentante ke Esperanto ne estas malamiko, sed male defendanto de la minoritataj lingvoj, kaj ke la homoj kiuj pri ĝi fi/misparolas, ĝenerale nenion scias pri ĝi. Sekvis aplaŭdoj kaj postaj gratuloj pro tiu romp-atako al la memkontenteco de kelkaj eminentuloj.

Restas la impresoj ke tiu elito, kiu daŭre kreas samtipan eliton, malbezonas ke oni trovu solvon por ĉiuj, ĉar tiam ĝi riskus perdi siajn privilegiojn. Kia rilato inter dulingveco de filo de usona ambasadoro aŭ de japana firmaestro, kiu lernas en Francio same france kiel en sia patrina lingvo, kaj tiu de filo de kaŝenmigrinto, kiu hejme parolas afrikan lingvon kaj lernas la francan surstrate? Tiu problemoj ne estis tuŝita.

*Renée Triolle
Vicprezidanto, estrarano pri edukado*

Sep vizaĝoj en monda forumo

Sep anoj de TEJO, el kvin landoj, partoprenis la 2-an Mondan Junularan Forumon de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj (25-29 nov., Vieno).

La Monda Junulara Forumo (MJF) estas la plej altnivela renkontiĝo pri junularaj aferoj ĉe UN. Ĉi-foje ĝi kunigis preskaŭ 400 junulojn el 150 landoj, kiuj venis reprezenti junularojn naciajn, regionajn kaj internaciajn, junularajn instancojn registarajn kaj ne-registarajn, kaj oficistojn de diversaj flankoj de la UN-sistemo.

Ĉeestis en MJF ne malpli ol 7 membroj de TEJO: Nóra Csiszár (Hungario) kaj Francisco d'Arcia (Kostariko) kiel reprezentantoj de TEJO mem, dum Fatemeh Aziz Mohseni, Mohammed Reza Torabi (Irano), Guy Raherinario, Emmanuelle Randrianasolo (Madagaskaro) kaj Joseph Truong (Usono) venis ja pro siaj rilatoj kun TEJO, sed kiel naciaj reprezentantoj.

La gejunuloj alvojaĝis Vienon i.a. por diskuti kiel konkrete efektivigi la rekomendojn de la "Monda programo de agado por gejunuloj ĝis 2000 kaj poste", UN-dokumento akceptita en 1995. En laborgrupoj ili pli detale debatis pri la 12 temoj traktitaj en la Programo, ekz. pri knabinoj kaj junaj virinoj, laboro, sano, komunikado.

La Forumo ŝajne estas la sola tutgloba kunsido kie junaj aktivistoj de

ĉie povas paroli pri siaj spertoj kaj ideoj, kaj ĝenerale ĝi sukcesis vere kunigi kaj interkonigi junulojn el la tuta mondo. Tamen, evidentiĝis organizaj misoj, el kiuj aparte gravis ke en la laborgrupoj mankis tradukistoj en la hispanan kaj francan (oficialaj lingvoj de MJF, kiel la angla). Tio protestigis multajn, precipe delegitojn el Latin-Ameriko, kiuj eĉ verkis rezolucion pri la afero.

La programo, iom strange kunmetita, ne tute helpis nin efike atingi la forumajn celojn. Sole la unuan tagon ni jam devis aŭdi 53 paroladojn! Ni pasigis tro da tempo en formalaĵoj anstataŭ en laborgrupoj aŭ per io pli utila.

La Forumo tamen donis al la sep TEJO-anoj aparte taŭgan okazon por konigi nian vizaĝon kaj paroli serioze pri niaj movado kaj organizo, ofte kun freŝa numero de *Dialog'* (la alekstera informilo de TEJO) enmane. Ni apenaŭ renkontis homojn kiuj forte kontraŭas Esperanton; male, kelkaj tre fervore subtenis la ideon kaj eĉ eklermetis la lingvon dumforume. Mi mem konatiĝis kun oficisto ĉe la UN-fako pri publika informado, oficejo kun kiu TEJO povus havi rilatojn. Tiaj

kontaktoj — aldone al niaj jamaj rilatoj kun la Junulara Fakto de UN — povus multe kontribui al pli altnivela rilatado kun UN estontece.

Nia partopreno en la Forumo montris al la tuta mondo ke Esperanto ne nur ekzistas, sed eĉ aktivis! Mi tre entuziasme atendas konkretajn rezultojn kaj projektojn de ĉi tiu Forumo por ni, kaj esperas eĉ pli da sukceso dum la venonta Forumo en 1998.

Joseph Truong
TEJO-komisiito pri UN-aferoj

Lingva misreĝimo

Oni klarigis la mankon de interpretado per multekosteco kaj petis nin mem trovi solvon en la laborgrupoj. La trian tagon parto de nia grupo uzis la hispanan anstataŭ la angla — kompreneble, ĝuste la gvidantoj ne tute kontentis. La grupgvidantino duonŝerce-duonserioze bedaŭris ke ne ĉiuj parolas Esperanton kaj petis paciencon dum la interpretado. En la lasta horo, dum plenkunveno, oni disdonis la finan dokumenton por eventualaj amendoj nur en la angla... Ĉi-foje pro tempomanko. La aero vibris, la homoj grumblis, la tempo pasis, kaj meze de la viglaj diskutoj la interpretistoj subite malaperis. (Ja ilia labortempo finiĝis.) La dokumento restis kia ĝi estis.

Nóra Csiszár (Hungario)

TEJO promociiĝis en Gvidan Konsilion

TEJO elektiĝis por dua dujara periodo en la Konsilan Komitaton de la Junulara Fakto de Konsilio de Eŭropo (KdE) kaj ankaŭ, unuafoje, en ties Gvidan Konsilion.

En la Konsila Komitato* 25 junularaj organizoj estas reprezentataj. La anojn de la Gvida Konsilio delegas 12 registaroj, 6 naciaj junularaj kon-

silantaroj kaj 6 internaciaj junularaj organizoj, inter kiuj por 1997-98 ankaŭ TEJO. Ĉi tiu konsilio decidas pri aferoj de la Junulara Fakto de KdE,

ĉefe pri tiuj de la du Eŭropaj Junularaj Centroj (en Strasburgo kaj Budapeŝto) kaj de la Eŭropa Junulara Fondaĵo, kiu disdonas monon por projektoj de internaciaj junularaj organizoj.

TEJO en la pasinta periodo estis reprezentata de Anna Ritamäki. Por la nuna periodo la taskon transprenos Ralf Gion Fröhlich, kiu akiris abundajn spertojn kiel prezidanto, ekde pasinta marto, de la sin malfondonta organizo Eŭropa Kunordiga Buroo de Internaciaj Junularaj Organizoj. [Vd. intervjuon en majo, p. 84.]

Anna M. Ritamäki
Komisiitino de TEJO
pri eksteraj rilatoj en Eŭropo

* Por la Konsila Komitato ni antaŭe uzis la tradukon "Konsultiĝa Komitato".

TEKSTOPRETIGISTO SERĈATA!

La Centra Oficejo serĉas volontulon pretan kunlabori kun la estonta redaktoro de *Esperanto-Dokumentoj*, d-ro Detlev Blanke, por fintajpi kaj pretigi tekstojn por kompostado en la Centra Oficejo. Bona kapablo pri Esperanto, rego de komputilo kaj de diversaj softvaroj, atentemo al detaloj kaj akurateco estas esencaj. Turnu vin al la ĝenerala direktoro, Osmo Buller (adreso en la kolofono).

TEJO seminariis kun skoltoj

"Junularo sen limoj — agado por internacia interkompreniĝo" estis la temo de la seminario kiun organizis kune TEJO kaj Skolta Esperanto-Ligo (SEL) inter la 26-a de oktobro kaj 2-a de novembro en Lublin (Pollando).

Ludo pri identeco helpis la skoltajn kaj esperantistajn seminarianojn el naŭ eŭropaj landoj kaj Kanado ekkoni sin kaj unu la alian: por plej bone difini sian identecon, ĉiu devis elekti tri el siaj ĉefaj trajtoj. La interkonatiĝon kompletigis neplanita nokta ekskurso tra la urbo.

En la unua plena tago ni parolis en tri laborgrupoj pri la temo, oficiale re-ekskursis tra la urbo, kaj spertis interkulturan malsamecon per pensostimula rolludo.

En la postaj tagoj prelegoj traktis diversajn temojn, kiel "Valoroj de pluraleca socio en Kanado" (Bill Mak, Kanado), raciaj metodoj de memor-fiksado (Aleksander Koval, Bjelorusio), volontulado en Britio (Jasper Sprengers, Nederlando), Interreto (Bruno Masala, Francio, kun helpantoj Dejan Mladenoviĉ kaj Renato Petroviĉ el Jugoslavio), rolo de radio-elsendoj en internacia kompreniĝo (Bruno Masala), aŭ la historio, strukturo kaj aktivado de TEJO (Anna Ritamäki, komisiitino de TEJO pri eksteraj rilatoj en Eŭropo kaj SEL-estranaro).

Aparta tago estis dediĉita al trovado de diferencoj kaj similecoj de la du movadoj esperantista kaj skolta. Pri

La seminarianoj ricevis multajn salutojn per retpoŝto.



Foto: Anna Ritamäki

Pola Skolta Asocio prelegis PSA-estranarino Ewa Lachiewicz.

En pluva tago kun ĉielo griza kaj premaj nuboj ni vizitis la koncentrejojn Majdanek, kie ni vidis la barakojn, la vestaĵojn, ŝuojn, fotojn de kaptitoj, kaj gaskameron.

Ni havis je nia dispono komputilan ĉambron kun 10 plej novaj aparatoj, kiuj peris al ni salutmesaĝojn (en Esperanto kaj nacia lingvo) el ne malpli ol 30 landoj. Ni ĝuis koncerton de Georgo Handzlik, belan kantadon kaj muzikadon de pluraj, kaj neforgeseblan muzikludadon sur dentoj, de Aneta el Lublin.

Ĉar, kiel kutime, Eŭropa Junulara Fondaĵo donis subvencion al TEJO por la aranĝo, estas des pli bedaŭrinde ke aliĝis malpli da homoj ol la antaŭviditaj 35. Spite al kelkaj malfacilaĵoj, Saskia Idzerda, Katarzyna Malinowska, Anna Ritamäki kaj Jarosław Fotyga sukcese organizis ĉion.

Informoj pri la venonta seminario de TEJO (27 apr. — 4 majo, Budapeŝto) kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe: Saskia Idzerda, Androsdreef 86, NL-3562 XC Utrecht, Nederlando; sjaidzerda@capvolmac.nl.

Renato Petroviĉ (Jugoslavio), kun informoj de Ewa Krach (Pola Radio)

Junularaj forumoj

Anna M. Ritamäki membris en la organiza komitato de la Junulara konferenco pri homaj rajtoj, kiun okazigis la Junulara Forumo de EU en Bruselo (14-17 nov.). La konferencon partoprenis ankaŭ du TEJO-reprezentantoj, Jimmy Stryhn Meyer kaj Helène Barković. (A.M. Ritamäki)

Eŭropa integriĝo kaj, ene de ĝi, kunlaboro de internaciaj junularaj organizaĵoj estis la temo de Budapeŝta seminario (24-26 okt.), organizita de Hungara E-Junularo kaj la landa junulara konsilio. Partoprenis trideko da HEJ-membroj, 13 invititaj e-istoj el eksterlando kaj deko da hungaraj junularaj aktivuloj nee-istaj. (Eventoj)

Eŭropa Esperanta



9 tagoj plenaj de informo, distreco, internacieco kaj Esperanto!

La plej granda Esperanta aranĝo en Eŭropo en 1997

Eŭropa Esperanta Kultura Semajno konsistas el:

- | | |
|--------------------|---|
| 10/05 - 13/05/1997 | Esperanta Kultura Festivalo en Aalen |
| 13/05 - 16/05/1997 | Eŭropa Junulara Parlamento en Stuttgart; paralele: antaŭkongresa ekskursaro |
| 16/05 - 19/05/1997 | Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart |

Mendu la duan bultenon kun detalaj informoj, aliĝilo kaj mendilo por loĝado kaj ekskursoj ĉe Esperanto Stuttgart, Dachtlerstr. 21, DE-70499 Stuttgart; tel. +49 / 711 / 138 89 80, faks. +49 / 711 / 138 89 82

Prezenti kaj ĝui E-kulturon

En la 24-a de novembro proksimume 80 esperantistoj kolektiĝis por la 13-a Esperanta Kulturkunveno de E-Propaganda Asocio de Oomoto en Kameoka (Japanio), por prezenti kaj ĝui Esperantan kulturon. Deklamoj, kantoj, teatraĵetoj, oratoraĵoj, ventroparolo kaj japanstila unupersona komika prezento (*rakugo*), prelegoj, bildteatraĵo, kongresraportoj, pup-teatraĵo kaj diapozitivaj pri Antverpeno plenigis la programon tra la tago.

Specialaj gastoj ges-roj William kaj Lusi Harmon el Usono prelegis pri la E-movado en Usono kaj prezentis projekton de televida kurso: *Esperanto, pasporto al la tuta mondo* (vd. okt., p. 166). En la antaŭa tago, preskaŭ 50 homoj kolektiĝis por unutagaj kursoj.

Joel Brozovsky (Japanio)



Foto: MATUNAGA Umeko

Poemon deklamas membroj de la ĉiusemajna bazlernejana E-kurso gvidata de Joel Brozovsky (maldekstre), kun helpo de NOGI Yoko (dua de dekstro). La infanoj poste prezentis mallongan kanton.

LINGVO

Kurba mispaŝo de Zamenhof

Zamenhof malobservis sian principon

En la antaŭparolo al la Unua Libro, la aŭtoro de Esperanto skribis jene pri la kreado de vortoj en sia lingvo:

[...] la vortaron mi kreis ne arbitre, sed kiom eble el vortoj konataj al la tuta klera mondo. Tiel ekzemple la vortojn, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj civilizitaj lingvoj [...] mi lasis tute sen ia ŝanĝo.

Kial, do, li ne elektis la adjektivan radikon *kurv-* kaj anstataŭe alprenis *kurb-*? Se oni komparas samsignifajn vortojn uzatajn en la "civilizitaj ling-

voj" de la "klera mondo", oni trovas ke angleparolantoj diras *curved*, hispanoj, italoj kaj portugaloj havas la adjektivon *curvo*, kaj *curvus* estas la latina formo. Krome, en la germana troviĝas la substantivo *Kurve*. Malgraŭ tio, Zamenhof neglektis tiujn civilizitajn lingvojn kaj donis al la Esperanta radiko la ortografion *kurb-*, kiu devenis de la franca etimo *courbe* (elp. "kurb"). Kial Zamenhof deviis de la principo klare esprimita en la ĉi-supra citaĵo?

Zamenhof estis nek lingvisto nek genio

Kelkfoje oni asertas ke Zamenhof estis lingvisto kaj genio, aŭ genia lingvisto. Tio estas troiga misprezento; li estis nur diletanta poligloto, kaj da ili svarmis miloj en Orient-Eŭropo de la 19-a jarcento. Analizo de la kialo de la enkonduko de *kurba* en Esperanton rivelas ke Zamenhof estis tutsimple sentiva prudulo. Tiu trajto devigis lin eviti vortojn en Esperanto similajn al etnolingvaj tabuvortoj. Unu el tiaj malpermesitaj vortoj en la pola lingvo estas *kurwa* (elp. "kurva"), kiu

signifas prostituitinon, malĉastulinon, ĉiesulinon. La oreloj kaj okuloj de la hontema Ludovikito ne toleris ke vorto kun identa prononco estu en lia lingvo, do li rifuzis alpreni la internacian formon *kurva* jam en la pra-Esperanto de 1881. Neniu kompetenta, faksperta lingvisto estus farinta tiun mispaŝon nur pro hazarda homofoneco inter la pola vorto *kurwa* kaj *kurva* en Esperanto. Ekzemple, en ĉiuj internaciaj planlingvaj projektoj publikigitaj post Esperanto, la responda radiko estas *kurv-* au *curv-* kun la konsonanto *v*.

Sentabuigo de *kurv-*

Kelkajn jarojn post la debuto de Esperanto, kiam Zamenhof fariĝis pli matura kaj malpli sentiva, li sentabuigis *kurv-* por uzi tiun radikon en sia reformprojekto de 1894. Tamen, tiu provo modifi la leksikon kaj gramatikon de Esperanto fiaskis, do la misa vortformo *kurb-* restis en la lingvo por konfuzi esperantologojn. Eĉ la erudita kompilinto de *Etimologia vortaro de Esperanto*, Ebbe Vilborg, ne sukcesis solvi la enigmon pri la *b* en *kurb-*, sed *ni* ja scias la kialon.

Bernard Golden (Hungario)

Vi jam multon aŭdis pri Eventoj...

Sed kial vi ankoraŭ ne abonis?
74 guldenoj (aerpoŝte: 86)
Pagu pere de UEA.
Abonu nun!

Reagoj



Vekiĝu ĉiu akademiano

Post 22 jaroj mi denove partoprenis Universalan Kongreson, kaj tie unuafoje kunvenon de la Akademio. Mi deziris min informi pri la laboro de, eble, la plej grava institucio de nia movado.

“La lingva Olimpo de Esperantujo” estis antaŭ ni: dek du sinjoroj kaj unu sinjorino. Temis pri la esontaj laboro kaj taskoj de la Akademio. Mi supozis ke nun okazos podiskuto — sed ĝi estis tre malvigla ĝis provoka demando de Andrzej Pettyn: ĉu ni entute bezonas Akademion? Sed okazis io kio tre ŝokis min. Unu membro de la Akademio ekdormis! Sin apogante al la tablo! Ĉu la diskutado ne estis sufiĉe interesa por li? Du akademianoj apud li estis bone edukitaj sinjoroj kaj ignoris lin. Mi estus puŝinta lin sub la tablo. Tri minutojn antaŭ la fino li vekigis, ekstaris kaj foriris!

Eble oni devus elekti en la Akademion nur fakulojn kiuj vere havas konon kaj sufiĉe da intereso pri Esperanto.

Katarina Eckstädt (Germanio)

Anoncu vin frue!

Mi supozas ke aliaj delegitoj spertis same kiel mi: kelkfoje alvenintoj en mian urbon telefonas al mi en la sama tago en kiu ili deziras mian helpon. Mi asistas *se mi povas*, sed kompreneble mi ja havas planojn kaj interkonsentojn jam faritajn. Multfoje mi ja veturigis esperantistajn turistojn tra mia urbo kaj la ĉirkaŭaĵo, kaj mi tre volonte faros tion plu, sed konsideru ke vi devas alskribi min frue.

Elna Matland (Bergen, Norvegio)

Arkivoj plu sekretaj

Vi citas (okt., p. 173) la supozon de Jean Amoureux ke la rusa registaro ne konsentis ke Francio donu al Zamenhof la ordenon de la Honora Legio. Pri tiu demando ekzistas preterpasa mencio de Ernest Drezen: “la franca registaro preli-

mine [= antaŭ ol agi] petis konsenton ĉe la cara polic-departemento”; li ne diras ĉu la rusoj donis la konsenton. Mia fonto estas la Moskva revuo *La Nova Etapo* (1932/4, p. 166), kiu samokaze ripetis pli fruan anoncon ke ĝi publikigos sekretajn dokumentojn el la arkivo de la carisma polico. La revuo ĉesis aperi en 1933, kaj ni atendas la publikigon ĝis hodiaŭ.

Ulrich Lins (Germanio)

Ekonomia solidareco

Reage al la artikoloj “Ĉu rizesperantistoj?” (apr., p. 65) kaj “Ni ne klopodu vendi ne finbakitan aferon” (okt., p. 176): Eĉ se mi estas fervora ano de la Tradicia E-ista Ideologio (vd. jul.-aŭg., p. 136), mi ne estas fetiĉema kaj konsideras lingvon kiel ilon por interŝanĝi informojn: se la ilo Esperanto ne utilas nek taŭgas al la bezonoj de la homoj, ĝi estas forĵetinda kaj anstataŭiginda per alia. Esperanto “finvenkos” kiam ĝi vere utilos al la homoj, kaj tiucele ni, klarvidaj pioniroj, ŝuldas aktive “enkorpigi” ĝin en ĉiajn sferojn de la homa vivo. Kial do la esperantistaro miras pri la helpopetoj de samideanoj el la “tria mondo”? Ĉu ne estas kompreneble kaj laŭnature ke malriĉuloj kaj malfortuloj petas helpon de pli bonŝancaj amikoj? Ja estas mirinde ke per la kosto de unu festeno en okcidentaj landoj oni povas vivi tutan familion dum monatoj en Afriko! Mi konsideras ke la ekonomia solidareco kongruas spirite

kaj fakte kun la celoj de Esperanto: mi proponas ke la kluboj okcidentaj sisteme asociiĝu kun tiuj de la tria mondo por ĉiel subteni ilin, kaj ke UEA kontrolo la pravecon de la helpo pere de sia Delegita Reto. Tiel evidentiĝos ke Esperanto utilas!

Éric Coffinet (Francio)

Kompleta misrigardo

En “Laste aperis...” (majo, p. 95) la vidbendo pri la 80-a UK en Tampere estas priskribita kiel “Kompleta trarigardo de la programeroj...”. Nu, la notinto evidente ne vidis la bendon. Ĝi estas unu plua en la ĝenerale ne tro bona oferto. Ĝi neniel donas akcepteblan imagon pri la kongreso. Teknike malbona, komplete amatora, ĝi montras nekomprenejon pri la fenomeno kongreso flanke de la vidbendintoj. Apenaŭ oni ion vidas pri la laboraj kaj fakaj flankoj, por ne paroli pri la kongresotemo. Kial UEA ne pagu finfine profesulojn, kiuj kompetente dokumentu la ĉefajn komponantojn de niaj kongresoj?

Detlev Blanke (Germanio)

Sensenca alternativo

Mi konsterniĝis, legante (apr., p. 75) la jenan titolon: “Alternativa kunlaboro kataluna”. Kaj tri liniojn pli malalte: “alternativaj sociaj problemoj”. Konstatante ke ĉi tiuj dirmanieroj havas nenian signifon, mi prenis mian PIVon kaj legis “alternativo. Necesa elekto inter du eblaj ofte kontraŭaj decidoj aŭ proponoj” (vorto oficiala). Cetere, tio respondas ekzakte al la signifo de la franca vorto *alternative*. Ambaŭ venas de *alterni*, fundamenta vorto: “sin sekvi laŭvice”. Do mi pravas: nenia signifo ekzistas en “Kunlaboro, kiu necesas elekti inter du eblaj aŭ kontraŭaj decidoj”, nek en “sociaj problemoj, kiuj sin sekvas laŭvice”. Perfekte senseca!

André Cherpillod (Francio)

INTERŜANĜO

Por rekte informiĝi pri la politika, ekonomia kaj kultura vivo en aliaj landoj mi deziras legi artikolojn el iliaj ĉefaj gazetoj kaj revuoj.

Mi serĉas Esperantajn tradukojn de tiaj artikoloj. La teksto ampleksu minimume 5 maŝintajpitajn paĝojn, estu tradukita de loka esperantisto kompetente reganta la internacian lingvon kaj estu ne pli malnova ol 6 monatojn. La nomo de la tradukinto aperu ĉe la artikolo.

Mi mem ofertas 6-paĝan artikolon aperintan la 30-an de septembro 1996 en *Der Spiegel*, la gvida politika magazino en Germanio. La artikolo enhavas ampleksan analizon de la 14-jara kanceliereco de Helmut Kohl, unu el la plej longe deĵorantaj registar-estroj de la demokrata mondo. La tradukinto de la artikolo estas Andreas Künzli, lic. phil., slavisto, ĉefredaktoro de svisa planlingva enciklopedio kaj fakdelegito de UEA pri interlingvistiko. Se vi interesiĝas pri mia propono, bonvolu sendi aŭ faksi al mi mian artikolon. Vi tuj ricevos la mian.

Dr. H.-Georg Macioszek, Bieberstr. 7, DE-20146 Hamburg, Germanio
Tel. 040/45 74 35; Fakso 040/ 410 71 91

Kion instruas 5000 bibliografieroj?

Esperantistoj kutimas verki, en Esperanto, por esperantistoj. Por ke tiuj valoraj kontribuoj ne restu – paradokse por lingvo internacia – en intelekta izolejo, necesas almenaŭ indiki ilian ekziston al la tutmonda klerularo. Jen kion helpas fari, jam de 17 jaroj, interlingvisto Humphrey Tonkin.

Tiu kiu deziras serioze studi la fenomenon Esperanto aŭ, pli ĝenerale, la fenomenon interlingvistiko, alfrontas grandajn praktikajn obstaklojn. Kontraste al studoj de la grandaj naciaj lingvoj, kiuj estas relative facile atingeblaj en la ĉefaj esplorbibliotekoj aŭ akireblaj per interbiblioteka prunto, studoj en kaj pri Esperanto kaj interlingvistiko estas ofte malfacile troveblaj. Signifaj studoj aperas en obskuraj revuoj, kaj estas ofte malfacile trovi difinitajn titolojn en la Esperanto-gazetaro, mem iom efemera kaj amatora. Revuoj aperas kaj malaperas. La Esperanto-bibliotekoj kutime ne havas profesiajn prizorgantojn, el ili ne eblas prunti materialon dedistance, kaj iliaj katalogoj ne estas kunordigitaj aŭ konsulteblaj defore. Eĉ se oni havas abundan monon (kaj malmultaj esplorantoj tiel feliĉas), oni ne povas teni bonan superrigardon pri la Esperanto-gazetaro kiel tuto. Kio validas por Esperanto, validas eĉ pli forte ĉe la diversaj projektoj de internacia lingvo, kie eĉ la projektoj mem estas foje malfacile spureblaj.

Kiel juna literatura esploristo, antaŭ pluraj jaroj, mi ofte primeditis la kontraston inter la relativa facileco trovi bibliografiajn informojn por la anglaj literaturo kaj lingvo, kaj la granda malfacileco trovi similajn informojn pri Esperanto. Ja ekzistis tiutempe du tri grandaj jaraj bibliografioj pri literaturo kaj lingvo, kiuj en la 1970-aj jaroj fariĝis daŭre pli ampleksaj kaj pli kompletaj, sed ili kutime ne enlistigis materialon pri Esperanto kaj certe ne okupiĝis pri studoj en tiu lingvo mem. Kiel instruanto en seminario pri bibliografio en unu el la ĉefaj esploraj universitatoj de Usono, mi trovis min en pozicio almenaŭ iom influi tiun situation, ĉar dum tiu periodo la usona Asocio pri Modernaj Lingvoj (MLA), la ĉefa faka asocio en mia kampo, esploris la eblecon komputiligi sian Jaran Bibliografion kaj petis sugestojn de kelkaj specialistoj.


Tiu mia kontakto kun MLA koincidis kun senpera kontakto fare de d-ro Willem Verloren van Themaat (Nederlando) kun la redaktoroj de la Bibliografio, al kiuj li komencis liveri bibliografiajn informojn pri interlingvistiko kaj esperantologio. Kiam, reage al tiu elpaŝo, la redaktoroj turnis sin al mi por peti fakajn konsilojn pri pliampleksigo de la ĉapitro de la Bibliografio pri t.n. Inventitaj kaj Internaciaj Lingvoj, mi tuj donis mian entuziasman subtenon, kaj tiel lanĉiĝis kunlaboro inter la Esperanto-movado kaj MLA, kiu daŭras ĝis hodiaŭ.

MLA: la plej kompleta

Sendube la Bibliografio de MLA donas la plej kompletan kaj plej facile konsulteblan jaran superrigardon pri la aktuala faka laboro en la kampoj de esperantologio kaj interlingvistiko. La formala titolo de la Bibliografio estas *MLA International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures* ("Internacia bibliografio MLA de libroj kaj artikoloj pri la modernaj lingvoj kaj literaturoj"). La verko aperas ĉiujare en kvin sekcioj: (1) literaturoj en la angla lingvo, (2) literaturoj en aliaj lingvoj, (3) lingvistiko, (4) ĝenerala literaturo kaj (5) folkloro. En 1994 la sekcio pri anglalingvaj literaturoj enhavis 11 860 erojn, tiu pri aliaj literaturoj 16 264, tiu pri lingvistiko 11 012, tiu pri ĝenerala literaturo 4 777, kaj tiu pri folkloro 2 916: sume do 46 829 erojn. Plejparte temis pri publikigaĵoj de la koncerna jaro, kvankam kompreneble aperis materialo el antaŭaj jaroj, pro preteratento aŭ malfrua publikiĝo.

La eroj en la bibliografio konsistas el kleraj studoj pri la koncernaj temoj. Do, en la bibliografio aperas ne literaturaj verkoj mem, sed artikoloj kaj libroj pri tiuj verkoj. Ĉiu ero en la bibliografio estas analizita kaj indeksita, tiel ke eblas trovi en unu loko, aŭ per resendo aliloken en la bibliografio,

ĉiujn erojn pri, ni diru, la gramatiko de la hispana, aŭ verboj en la hispana, aŭ lingvouzo en la verkoj de Cervantes ktp. Dua granda volumo konsistas el indekso, egale longa kiel la bibliografio mem. Ĝi enhavas abundajn klasifikojn de la koncerna materialo, tiel ke eblas trovi erojn dise distribuitajn tra la kompilaĵo.



Auld, Miyamoto, Zamenhof... kion fari


Armeo da bibliografoj

Kompilas la gigantan verkon tuta armeo da bibliografoj. Entute 21 oficejoj en la centra oficejo de MLA okupiĝas pri la Bibliografio. Pliaj 36 volontulaj t.n. ĉefbibliografoj, el kiuj mi estas unu, subtenas tiun stabon, kaj kromaj 76 homoj kontribuas per bibliografiaj eroj.

Ĉiujare, du- aŭ tripersona teamo laboras super la ĉapitro pri inventitaj kaj internaciaj lingvoj. Nuntempe tiu teamo konsistas el d-ro Detlev Blanke kaj mi. Mi mem estas ligita al la projekto jam de la komenco kaj precipe de la periodo, nome 1980, kiam oni unue plene komputiligis la kompiladon kaj konservadon de informoj. Kutime en nia ĉapitro aperas tricento da eroj. Por ĉiu ero d-ro Blanke kaj mi pretigas apartan formularon, kiu enhavas informojn pri la titolo kaj aŭtoro de ĉiu verko, kaj, ĉe libroj, pri la loko de eldono, la eldonisto kaj la nombro de paĝoj. Se temas pri artikoloj, ni notas la titolon de la revuo, la jarkolekton, numeron kaj paĝamplekson. Ni poste analizas la verkon. Ĉu ĝi rilatas al iu lingvistika aspekto de Esperanto: leksikologio

(kaj do, eventuale, ankaŭ neologismoj, terminologio, etimologio ktp), sintakso, fonologio ktp? Ĉu al la konsisto de la Esperanto-movado, aŭ ties historio, aŭ la vivo aŭ filozofio de Zamenhof? Ĉion ni notas. Ni etendas vaste nian reton, enprenante ĉiujn erojn kiuj povus interesi lingviston aŭ socilingviston kaj doni aliron

tagajn vizitojn jare al la Biblioteko Hodler en Roterdamo por kolekti materialon. Krome mi pasigas pliajn tagojn en la kompilado, korektado kaj ordigo de la materialoj. Mi aldonu ke sen Biblioteko Hodler mia laboro estus multe malpli facile farebla, se entute. Ni foje subtakas la valoron de nia Asocia biblioteko.



por ke ili trovu sian lokon en aŭtoritataj bibliografioj?

al tiu lingve bazita fenomeno kiu estas Esperanto.

Erojn pri la literaturo de Esperanto ni metas en aliajn volumojn, do ne en la ĉapitron pri internaciaj lingvoj. Verkoj pri unuopaj literaturaĵoj aŭ aŭtoroj kutime aperas en la koncerna geografia ĉapitro. Sekve, Auld havas lokon sub la skota literaturo, Miyamoto sub la japana. Tiu estas tre nekonvena aranĝo, precipe por Esperanto (kien meti Szilágyi aŭ Sekelj, aŭ eĉ Zamenhof mem?), rezultanta el la planado de la 1970-aj jaroj, kiam oni ne donis sufiĉan atenton interalie al internaciaj fenomenoj kiel Esperanto (malgraŭ mia propra mansvingado tiutempa). Tamen, ĉiu ero estas ankaŭ indeksita sub diversaj kategorioj kaj sekve facile trovebla. Eroj kiuj traktas Esperanto-literaturon ĝenerale trovas lokon kutime en la sekcio pri Ĝenerala Literaturo. Aldone al la eroj en la volumo pri lingvistiko, aperas tiel 50-100 eroj pri Esperanto-literaturo, dise en la literatura volumoj.

La laboro de analizado estas intensa kaj longdaŭra. Bibliografo devas havi adekvatajn paciencon kaj precizemon. Mi mem kutime faras unu aŭ du kelk-

Krome, la pli fruaj bibliografioj estas nun simile konsulteblaj sur disko, kvankam sen la same detala indeksado. Ankaŭ tiuj diskoj, kun miliono da eroj, inkluzive de 5000 pri esperantologio kaj interlingvistiko, estas troveblaj en multaj ĉefaj bibliotekoj tra la mondo.

Reciproka servo


Reciproke, kontraŭ tiu granda laboro, ni atendas ion de vi: vian helpon trovi gravajn erojn, precipe en naciaj lingvoj, kiujn ni alikaze ne trovus. Laŭeble sendu al ni kopion de la kompleta teksto kaj informu nin pri la enhavo. Redaktoroj, numeru viajn revuojn konsekvence, indiku la jar-kolekton klare, kaj esprimu tiujn informojn simple. Eldonistoj, metu jaron en vian eldonaĵon kaj numerojn sur la paĝojn. Pensu foje pri la povra bibliografo, kiu poste devas ĉion deĉifri. Inter niaj ĉefaj malamoj estas tiuj revuetoj kiuj aperigas suplementojn kun apartaj paĝnumeraj sistemoj, aŭ improvize kunmetas sian materialon. Kaj, verkistoj, ne sendu la saman artikoleon al dekduo da gazetoj, ĉiam kun malsama titolo, kun la espero ke iu ie ĝin

aperigos. Estu sistema kaj respekta al la redaktoroj, kaj faru vian eblon konsciigi la redaktorojn pri la neceso de trakti ankaŭ vin. Kompreneble gravas ankaŭ ke niaj fakuloj uzu la Bibliografion kaj informu la bibliotekistojn ke ili el tio fake profitas.

Ĉi-jare mi festos (se tiu estas la ĝusta vorto) mian deksepan jaron kiel kunlaboranto de la Bibliografio. Kion oni povas rimarki pri la progreso de interlingvistikaj kaj esperantologiaj studoj tra tiu periodo? Unue, oni devas noti la kvantan kreskon de la aperanta materialo kaj la relative altan kvaliton de almenaŭ parto de ĝi. La faka aliro al la demandoj estas pli klera kaj pli kohera nun ol ĝi estis en tiu pli frua epoko kiam mi komencis mian laboron. Due, oni povas rimarki ioman progreson pri pluraj fundamentaj demandoj — ekzemple, la biografio de Zamenhof, kie finfine ni komencas ligi lian vivon al la pli vastaj intelektaj fluoj de la periodo. Trie, oni povas ĝenerale rimarki progreson en la kompreno pri la historio de la Esperanto-movado, almenaŭ en la intermilita periodo — dum pli aktualaj jaroj ankoraŭ atendas sian senpasian analiziĝon. Kvante, la studado de leksikaj demandoj evidente bone fartas, kvankam la kompreno de la faktoroj kiuj efektive influas la ŝanĝiĝon de la lingvo kaj fiksas ĝian veran uzon, estas ankoraŭ ne adekvate evoluinta. Pri morfologio, semantiko kaj gramatiko aperadas de kelka tempo seriozaj studoj, kaj la projekto DLT signife antaŭenigis la studadon en tiuj terenoj.

Restas tamen nekontentiga la studado de la parola lingvo, mankas konvinka elmapado de la gramatiko de Esperanto kaj — sur iom alia tereno — bona tradicio literaturkritika kaj recenza. Multo restas por fari. Sed se de tempo al tempo niaj organizaj aktivuloj timas ke mankas malantaŭ ili soldatoj en la paca batalo, ili kaptu kuraĝon de niaj esperantologoj, kiuj pli multnombre, pli diligente kaj pli efike faras sian laboron ol povus imagi iu kiu ne konsultas la Bibliografion de MLA.

*Humphrey Tonkin
Office of the President
University of Hartford
West Hartford, CT 06117, Usono*



Moderne kaj koncerne

La aĵoj kaj la sezonoj. Ulrich Becker. Kun ses gravuraĵoj de Uday K. Dhar. Vieno: Pro Esperanto, 1996. 114p. 23cm. 21,00 gld.

Jen kutima itinero de aŭtoro ĉi-generacia. Hamstri oskarojn en literaturaj turniroj kaj ilin poste faskigi volumen. Ĉi-raŭte ankaŭ la germano Ulrich Becker. La nunan volumon konsistigas dekduo da noveloj originale ŝpinitaj en Esperanto. La temoj gamas de ekologio ĝis eskatologio. Varie kaj bunte.

Becker uverture orbitas ĉirkaŭ ekologiaj konsideroj. Ne larmomelke kaj paskvile, sed sarkasme kaj satire. La vivuloj niaplanedaj koluzias kaj komplotas kontraŭ la homa specio, el kio rezultas rezoluta rezolucio. Legu mem kaj meditu.

La dua pafo portas la saman titolon kiel la kolekto. Aĵoj kaj sezonoj. Pasoj kaj trenoj. Maljuno kaj senilo. Dekadenco kaj ruino. Unu el la pintoj ĉi-volumaj. Fajna sentigo pri la homa kadukiĝo, kiun fonas la indiferento de koitaj bestoj kaj objektoj stazaj. La ĉirkaŭo ŝultrumadas pri nia neniigo. Pensige kaj perturbe.

En la saltiero de Becker malreliefas nun du bidoj. La tria kunkaĉigas la gurdajon pri transporto-cele korp-diseriga maŝino kun la mito pri la Fina Venko. Misrezulte, laŭ mia gusto. La kvara meritas la titolon "Trompo". Temas ja pri modernaĵo, kies roluloj spitas la verkiston kaj renversas la rakonton. Ankaŭ misefike, laŭ mia palato.

Ĉi fiaskojn plene kompensas la kvina ero. La plej bela kaj sukcesa. Afrika aromo ĝin trablovas kaj trasuplas. Ĉi-tekste Becker poetas kaj pegazas. Nur aeda imago povus fasoni la eskvizitan figuron de Nanimbo, nigrulo kiu kolektas... okulojn. Ĉar la homoj ja perdas siajn okulojn, pretervidas gravojn, palp-iras kaj stumblas!

Post la Berlina murofalo restis ŝiboletoj kaj etiketoj, kiujn pritemas letero de juna orient-germano al lia avinjo.



Gravuraĵo de Uday K. Dhar el "La okuloj de Nanimbo"

Por kolektantoj

Panoramo de la novai au universalaj alfabetoj kaj ortografio por la Zamenhofa lingvo. Jon Walter Yung (1937-91), kun la helpo de Christian Pradelet kaj Yannic Gicquel. Tuluzo: AEIOU, 1995. 336p. 21cm. 39,00 gld.

En 1966 aperis libro *Universala Skribo*, kies aŭtoro, Manuel Halvelik, interalie proponis reformskribon por Esperanto. Tridek jarojn poste ni konstatas ke neniuj adoptis ĝin, nek uzis ĝin, eĉ ne menciis ĝin — ĝi malaperis neniejen.

En 1995 aperis la tie ĉi recenzata verko, kovrile titolita *Panoramo de la Universala Skribo*. Ni vetu ke ĝi havos saman sorton.

Ne temas pri la sama "universalaj skribo": tiu de Halvelik estis simpla anstataŭigo de la ĉapelitaj literoj per

Interesa perspektivo de ĉeulo. La epistolon sekvas "Bagateloj": ses peniktuŝoj, arpeĝe ŝrumpaj, pri la homa komedio.

Post ĉi rakontoj iom splitaj, sekvas po du koneksaj sesoj. La unua temas pri amo kaj amoro glaŭkaj*. Nu, malgejo povus tie admiri nur la farbojn, neniel la pentraĵon... Ĉi-prisme konfesindas ke la lingvaĵo de Becker atingas ĉi tie sian kulminon de plastiko kaj rafino. La dua seso kolibras ĉirkaŭ temoj tipe esperantismaj: vojaĝemo, rasismo, ksenofobio, lingvolerno.

La volumon ŝlosas ĝia plej longa, dislegebla kaj plurtavola teksto: "La Esperanto-maŝino". Temas pri ia apokalipse esperantkonscia distordo de pacismaj kaj finvenkismaj seraĵoj. La aŭtoro ne proponas solvojn nek receptojn, sed nur svagojn kaj pensigojn. Intence kaj intense. Postrestas ia brulodoro nazospita, kiu kuspas nian beaton. Alivorte, Becker trafis almenaŭ unu celtabulon.

Ĉi germano verkas verve, meme kaj ĝuige. Ankaŭ moderne kaj koncerne. Stile li tamen ne atingas la firstojn de ekz. Liven Dek aŭ Sten Johansson. La aĝo kaj la sezonoj certe alportos iom da raboto kaj poluro. Enestas ankaŭ kelkaj leksikaj stumbloj, kiujn povintus foradzi pli atenta relego aŭ legigo.

Gonçalo Neves (Portugaliao)

*glaŭka: geja (surbaze de *Glaŭka lum'*, titolo de geja poemaro aperinta sameldoneje)

aliaj (plus nova signo 3). Tiu de Yung, kontraŭe, rekte atencas la unuecon de Esperanto mem — pretendante doni al Esperanto pli "internacian" grafismon, li fakte nur kopias sklave la anglan.

Laŭ kompilinto Yannic Gicquel, temas pri artikolaro aperinta dise en *Liguna*, bulteno de Unio por la Nova Alfabeto, sendita al kunlaborantoj en 1990 kaj 1991. Kvankam mi loĝas en Tuluzo de 1980, mi neniam aŭdis ion pri Yung kaj Gicquel, nek pri UNA kaj ĝia bulteno.

Tiu ĉi libro estas malbonege redaktita: ĉiu argumento kaj donitaĵo estas ripetita fojon post fojo ĝistede; la stilo estas peza kaj emfazaĉa; kaj ne mankas eĉ rektaj lingvaj eraroj, por ne menciigi neologismojn kaj amasajn francismojn.

Jen libro por kolektantoj de neutilaj stultaĵoj.

Rikardo Cash (Francio)

Petole kaj romantike

La nuda feino. Ok erotikaj rakontoj. Leopold Vermeiren. El la nederlanda. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1993. 108p. 21cm. 25,20 gld.

La ludanta lumo. Kvin erotikaj rakontoj. Leopold Vermeiren. El la nederlanda trad. Cor Willems. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1995. 93p. 20cm. 24,90 gld.

“Ĉu vere? Ho ve! Terure! Protektu la infanojn! Bruligu la librojn! Enkarcerigu la verkinton!” Tiel reagus multaj en mia lando, kie nuntempe furoras batalo pri sekso, erotiko kaj pornografio. Neniu moralulo akceptu pornografion! Do, kiel ni klasu la suprajn verkojn? Al kiu en nia internacia kulturo ili plaĉos? Ĉu la rakontara fokuso estas sekso? Mi dirus ke ne. La rakontoj ja plejofte enhavas seksan. Aŭ aludas al ĝi. Sed tiu kiu legos kun espero al brulaj priskriboj de pulsantaj korpopartoj, rapide elreviĝos. La rakontoj neniam detalias koitadon, kaj ofte aŭ finiĝas aŭ fortornigas la rigardon antaŭ tiu momento

Ne, la rakontoj traktas amon, etoson, poezion kaj fantazion. Petole. Romantike. Elstaras la bonaj intrigoj. Uja rakonto entenas la aliajn: Juna paro, Silvia kaj Marko, enamigās, kaj ilia rilato profundigās. Ĉiutage Silvia elektas tri vortojn, ĉirkaŭ kiuj Marko kreas rakonton. Foje li fantazias feinson, principinon aŭ marvirinon. Iuj rakontoj enhavas pli homan personaron, kiu iom fantazie agas: monaĥinojn, ekzemple,

kiuj eskapas por naĝi nude en la maro. Kaj kelkaj estas sufiĉe kredeblaj, se oni akceptas rakonte-rapidan progreson de la rilatoj. Ŝafisto kaj turistino, bakisto kaj kliento. Malgraŭ tio ke ni antaŭvidas sukcesan, eventuale suk-seksan finon, ĉiu rakonto prezentas interesan, surprizan disvolviĝon kaj ofte ĉarman bildon de la roluloj. En tiu kadro, oni komprenas ke rolas nur junaj, belaj personoj.

Sed leganto povas taksi la verkon de ekster la kadro. Ĉu la verkisto ne povus doni pli da vario? Ĉu la erotika flanko tiom koncentriĝu al “pirformaj mamoj” kaj “malhela triangulo”? Ĉu “monteto” eŭfemismo tiom konstante? Jes, plendetoj eblas. Espereble la aŭtoro kaj tradukinto baldaŭ prezentos alian provon eĉ pli bonan. Ĉu erotika, pornografia, aŭ io alia? El mia zorga studo de la distingo, mi konstatis ke io erotika estas tio kion la leganto/parolanto ŝatas. Pornografio estas tio kion alia, fia malmoralulo, ŝatas. Laŭ tiu kriterio, ĉi tiuj verkoj rajtas je sia subtitolo.

Derek Roff (Usono)

SEJM rekte tuŝebla

SEJM. Historia skizo. D. M. Cibulevskij. Moskvo: Impeto, 1994. 204p. 21cm. 9,60 gld.

Ĉi tiu movadhistoria kompilaĵo interese raportas pri junulara organizaĵo e-ista de la jaroj 1966-1979, kiu—ĝenerale ekster la atento aŭ imago-povo de la E-publiko en la cetera mondo—vivis sian propran vivon kaj funkciis laŭ propraj leĝoj, eĉ en neoficialeco (p. 3): Sovetia Esperantista Junulara Movado (SEJM). Perestrojk-epoke, kiel preskaŭ ĉio alia rilate Sovetion, ankaŭ la loka E-movado iĝis pli travidebla. SEJM-ĉefroluloj apenaŭ aŭ nur teorie konitaj, kiel Cibulevskij, Aroloviĉ, Bronŝtejn, Ŝilas, Cvetkova, Perevertajlo, Zajdman, Jegorovas, Lineckij, Gonĉarov, Kolker, Samodaj k.a., finfine iĝis rekte tuŝeblaj de siaj iamaj “klas-malamikoj”. Ja, tiuj tiamaj vervaj gejunuloj intertempe oldiĝis; verŝajne

senlime ĉagrenate de la nuntempa “merda” situacio en sia disŝirita patrujo, ili nostalgie kaj eble eĉ iom funebre sopiras pri tio kio iam estis kaj ne-revokeble pasis. Inventari tiujn eventojn neforgeseblajn—kaj fremdajn al la nova aktivula generacio—estas la ĉefcelo kaj ĉefmerito de la kungluta broŝuro, kies enhavo etendas sin de organizaj dokumentoj ĝis popularaj kanzonoj de la idilia SEJM-periodo, diurne kantataj dum la famaj SEJT-oj (tendaroj de SEJM). Tre utilaj (sed bedaŭrinde ne ĝisdataj) estas la prezentitaj biografioj de kelkaj SEJM-motoroj. Al la minusoj de la verko, historiografie tre grava, apartenas la nepolurita lingvaĵo kaj precipe la fuŝa tipografio.

Andy Künzli (Svislando)

Foli- ume



• Japanoj SClaS

Nova priscienca gazeto de la japana ĵurnalo *Asahi* nomiĝos *SClaS*. La eldonejo klarigis ke la nomo, elektita el 5 mil proponoj de legantoj, devenas el la Esperanta verbo “scias”—kaj krom tio ĝi ja mallongigas la anglan *Science Asahi*. (*La Revuo Orienta*)

• Vogelmann en novaj lingvoj

La nova realismo de Bruno Vogelmann lastatempe aperis en du pluaj lingvoj. En la serba ĝin eldonis la tradukintino Tereza Kapista; la ĉeĥa traduko de Miroslav Malovec aperis ĉe la e-ista firmao Kava-Pech. (R. Petroviĉ)

Oni nun atendas hungaran tradukon de Péter András Rados, kiun eldonos Vilmos Benczik.

• Preskaŭ kompleta inkunablaro

Dank’ al la alvokoj de Reinhard Haupenthal (i.a. nov. ’95, p. 194) kaj diversflanka helpo, estas retrovitaj jam 115 el la 118 Esperantaj inkunabloj (Esperanto-titoloj aperintaj antaŭ 1900). ITÔ Kanzi nun planas kompletigi sian *Ludovikologia dokumentaro* per la tuto de la fama “Kolekto Esperanta aprobita de Zamenhof”. Kiu posedas ties unuajn eldonojn, kontaktu Reinhard Haupenthal (Schulstr. 30, DE-66133 Saarbrücken, Germanio; ☎/✉+49/681/816-713).

• Elektronikaj bultenoj

Luis Guillermo Restrepo Rivas (lrestrer@eppm.epm.com.co) eldonas “neregule, sed proksimume ĉiunmonate” *Kolombia Bulteno*, elektronikan bultenon pri E-o en Kolombio. La unua numero aperis la 4-an de decembro, kun anonco de la 3-a Kolombia E-Kongreso (15-17 novembro 1997, Medeĵino [Medellín]).

Ekde januaro dissendiĝos elektronika Esperanto-revuo kun temoj kaj novaĵoj el Ĉilio, abonebla por 5 usonaj dolaroj al la UEA-konto “ceaa-c”. Kontaktu Hector Campos Grez, Casilla 231, Curico, Ĉilio; ✉strigo@entelchile.net.

Tri kuriozaj studoj

Historio de la ciferoj. 26p. 21cm. 9,90 gld. **Katarismo kaj naskiĝo de Inkvizicio.** 35p. 21cm. 9,90 gld. **La mortotuko de Torino, la neebbla objekto.** 145p. 21cm. 30,00 gld. André Cherpillod. Courgenard: la aŭtoro, 1996.

André Cherpillod estas kurioza verkisto. Akademiano, senlaca esploristo de vortaroj, granda ŝatanto de historio, li verkas samtempe klare (eĉ klerige) kaj distre. Informojn, datumojn kaj argumentojn li prezentas en flua, vigla, intereskapta prozo kune kun anekdotoj kaj epizodoj ofte spicitaj per grajnoj da humuro.

Tri pliajn librojn li pretigis (ankaŭ memeldone) en 1996. La unua, *Historio de la ciferoj*, igas la leganton vojaĝi de tempo al tempo, kun mano kaj cerbo pretaj por kalkuli, de primitivuloj ĝis araboj kaj eŭropanoj tra egiptoj, sumeranoj, babilonanoj, grekoj, hebreoj, romianoj, ĉinoj, japanoj kaj hindoj. Troveblas en ĝi, ekzemple, la matematike *nerefutebla demonstro*, farita komence de Reformacio, ke la monstra besto de Apokalipso numerita 666 estas neniu alia ol la papo!

En la dua, *Katarismo kaj naskiĝo de Inkvizicio*, la aŭtoro rakontas al ni la historion de kataroj (vorto certe preferinda al la PIV-a *kataristo*), de

ilia apero en Okcitanujo en la 11-a jarcento ĝis ilia ekstermo fare de favorantoj de la roma eklezio, kies plej



La homo de la Mortotuko: ĉu Jesuo? (el *La mortotuko de Torino*)

grava evento estis la detruo de la kastelo de Montseguro en 1244. En tio Cherpillod vidas la naskiĝon de Inkvi-

zio, kiun li priskribas detale kaj sen ia ajn simpatio, evidente. Pli interesa mi trovas la parton klarigantan la originon kaj la dualisman doktrinon de kataroj. Mi mem emas konsenti kun ilia kredo ke ĉi mondo, esence malbona, ne povas esti kreita de bona dio. Kaj mi samopinias ke sian sorton ili ne meritis, malgraŭ pluraj trajtoj ĝene *talibanecaj**, kiel ilia principo (ne emo!) manĝi vegetale.

Tutan libron 145-paĝan konsistigas *La mortotuko de Torino, la neebbla objekto*. Se mi devus klasi ĝin por katalogo, mi metus ĝin en la klasojn *Historio, Geografio, Religio, Scienco* kaj *Romanoj*. Ĝi temas pri relikvo, konservata en la katedralo San Giovanni de Torino, kiu laŭdire estas la mortotuko en kiu estis sepultita Jesuo, konata ankaŭ kiel Kristo. La Mortotuko prezentas bildon de nuda homo, plej probable Jesuo, ne pentritan, sed kvazaŭ projekciitan. Plimulto supozas ke aŭ ĝi estas mezepoka falsaĵo (jes ja, mezepoka), aŭ ĝi estas mirakla bildo. Rezulte, kiel prave skribas Cherpillod, multaj nekristanoj aŭtomate deklaras ĝin falsa, dum multaj malateistoj kredas ĝin aŭtenta nur tial ke ili jam kredas al la bibliaj instruoj. Ambaŭ grupoj "rigardas religia afero tion, kio estas inda nur je scienca esploro". Laŭ Cherpillod ekzistas tria solvo, kiun li lerte disvolvas en sia verko: la Mortotuko estas bildo neniel mirakla, sed aŭtenta, kvankam ĝian estiĝon oni ankoraŭ ne povas klarigi.

Cherpillod montras ke ĉiuj observadoj arĥeologiaj, historiaj kaj sciencaj konverĝas al verdikto pri aŭtenteco, escepte de la datado de la teksaĵo per karbono 14, ne kongrua kun la rezultoj de ĉiuj antaŭaj sciencaj traserĉoj. El tio la titolo: la neebbla objekto.

Mi legis ĝin unutire, kiel suspensan romanon. Li sukcesis vekti en mi scivolon pri la Mortotuko. La ĉapitrojn pri ĝia historio antikva kaj moderna, pri la tuko kaj la bildo kaj pri la datado sekvas tri veraj perloj de nia prozo, nome pri la homo sur ĝi videbla, pri la demando ĉu vere temas pri Jesuo, kaj pri la eventuala mezepoka falsisto. Mi varme rekomendas ilin ankaŭ kiel suplementon al *La Majstro kaj Margarita* de Miĥail Bulgakov.

Jorge Camacho (Bruselo)

**talibaneca* (ĉi tie): religie ekstremisma

Kaŝita trezoro de erudicio

Konciza gramatiko de Volapuko. Gramat brefik Volapŭka. André Cherpillod. Courgenard: la aŭtoro, 1995. 47p. 21cm. 15,00 gld.

Esperantistoj kutime scias ke pastro Schleyer inventis Volapukon en 1879 kaj proponis ĝin al la homaro kiel internacian lingvon. Li pruvis la unua ke planlingvo eblas en la praktiko: dek jarojn post la naskiĝo de la *mondlingvo* oni kalkulis 283 societojn, 316 lernolibrojn en 25 lingvoj kaj 25 revuojn. La nuna libro ne temas tamen pri la verko de Schleyer (Volapŭk I), sed pri la reformita Volapuko kiun kreis la nederlandano de Jong en 1929 (Nova Volapuko aŭ Volapŭk II). Notu tamen ke la aŭtoro mencias preskaŭ ĉiujn diferencojn inter tiuj du.


La gramatiko de Cherpillod respondas al bezono ne de lernolibro, sed de referenca verko. Ĝi estas detala kaj ordigita priskribo de fonetiko, morfologio kaj sintakso, ĉiam laŭ la vortkategoriaj paradigmoj de tradiciaj gra-

matikoj. Tamen ĝi povas bone roli ankaŭ kiel lernilo, kvankam mankas ajna indekso, kaj eĉ minimuma vortareto dudirekta. Cherpillod laboras nun pri Volapuk-vortaro: li ja povintus enmeti ekstrakton. Tiuj etaj misoj fakte apenaŭ gravas, se konsideri ke la tuta libro paradas per solida lingvo-scio kaj bonega filologia tralaboro. Ja cel-konsciajn lingvistojn bezonas Volapuko — kaj Esperanto!

La aŭtoro avertas ke sian gramatikon li verkis por interlingvistoj kaj por scivolemuloj. Oni ne forgesu tion. Cetere, eble nur tia publiko volonte aĉetos ĝin: ja la elementaj bindo kaj prezento ne tro instigas al aĉetado. Kiel oftas ĉe Cherpillod, rudimenta ekstera aspekto kaŝas trezoron de erudicio, disciplino kaj metiismo.

Antonio Valén (Hispanio)

Laste aperis



Arboj en Aŭstralio kaj suda Eŭropo. 6-lingva terminaro. Lilli Giloteaux. Croix: la aŭtoro, 1996. 20p. 21cm. 82 arbonomoj latine, germane, france, nederlande, angle kaj Esperante, kun ilustraĵoj pri ĉiu planto kaj ties frukto. 4,80 gld.

Budho kaj la moderna homo. Hermann Schröder (1920). [1996]. 33p. 21cm. Konciza enkonduko al budhismo. 3,60 gld.

Cikatro de amo. Vasilij Eroŝenko (1890-1952). Komp. Mine Yositaka. El la ĉina trad. Shi Chengtai kaj Guozhu. Toyonaka: Japania E-Librokooperativo, 1996. 113p. ISBN 4-930785-44-8. 18cm. Kvar fabeloj verkita en 1922-23 en la japana. La fonto-teksto estas traduko de Lusin al la ĉina, kiu supezeble konsultis la aŭtoron pri interpretoj. 14,70 gld.

Ĉu vi kuiras ĉine? (1976). Johán Valano (ps. Claude Piron, 1931). Vieno: Internacia E-Muzeo, 1996. 135p. ISBN 3-901752-02-1. 23cm. Kiu murdis la junan farbiston? La unua enketo de detektivo Jano Karal, fonda volumo de la legenda "Ĉu-serio". 24,00 gld.

Fabloj. Jean de la Fontaine (1621-1695). El la franca trad. (1948) Lucien Thévenin. Paris: UFE, 1996. 84p. 21cm. 66 el la 250 moral-instruaj besto-poemoj de la poeto plej bone konata en Francio. 13,50 gld.

Gvidlibro pri vojaĝo en Hirosima, la urbo de monumentoj. Hirosima: Hirosima E-Centro, 1996. 59p. 21cm. Fotoj. Kun emfazo al la postsignoj de la atombombado. 7,50 gld.

Kodo de la moralo universala. Salvatore Porcu. El la itala trad. Lina Gabrielli. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1996. 101p. 20cm. Vivogvidaj reguloj inspiritaj de katolikismo. 21,00 gld.

Maljunulino kiu paŝis en la maro, La (1988). San-Antonio (ps. Frédéric Dard, 1921). El la franca trad. Armela LeQuint kaj Jak Le Pui. [Paris]: France-Esperanto, 1996. 349p. ISBN 2-9507376-1-7. 18cm. "Burleska historio... de maljuna aventuristino kiu elektas heredanton... kaj instruas lin pri ŝtelarto... feinrakonto nigra ĝis vertiĝo." (la aŭtoro). 49,50 gld.

Meine sieben Festungs-Psalmen (1875). Johann Martin Schleyer (1831-1912). Saarbrücken: Iltis, 1996. 16p. ISBN 3-927613-27-4. 21cm. Dulingva: latina-germana. Sep psalmoj, kiujn la aŭtoro de Volapuko verkis en malliberejo. 13,80 gld.

Oldulo kaj la maro, La (1952). Ernest Hemingway (1899-1961). El la uson-angla trad. Fernando de Diego. Chapecó: Fonto, 1996. 103p. 21cm. Ilustraĵoj de C.F. Tunnicliffe kaj R. Sheppard. Klasikaĵo de Nobel-premiito, pri batalo inter unuopa homo kaj fortoj de la naturo. 21,00 gld.

Pasiono de Perpetua kaj Feliĉita, La (203 p.k.). El la latina trad. Gerrit Berveling.

Breda: VoKo, 1996. 28p. 21cm. Voĉoj Kristanaj 24. Atestaĵo kiu, per viziaj sonĝoj, priskribas la situacion kaj esperojn de du martirinoj. 6,00 gld.

Po — la diabla vorto. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1996. 19p. ISBN 2-906134-34-1. 21cm. Gvidlibreto por ĝuste uzi la vorton kiu laŭ iuj estas la plej malfacila en Esperanto. 7,50 gld.

Reĝo sen distriĝo (1) (1947). Jean Giono (1895-1970). El la franca trad. Pierre du Cheyron de Beaumont (1923-1981). Paris: UFE, 1996. 76p. 21cm. Unua parto de romano. 13,50 gld.

Strategisch en tactisch plan voor de Esperantobeweging in Vlaanderen: Periode 1996-1997; Bijlagen. Red. Marc Vanden Bempt. Nederland-lingva. Leuven: FEL, 1995. 64p. 21cm. Strategia kaj taktika plano por la E-movado en Flandrio. 7,80 gld.

Tabako kaj diablo (1916-1927). AKUTAGAŬA Rjuunosuke (1892-1927). El la japana trad. IĈIMURA Ŝiroo. Tokio: Librejo Satano, 1996. 67p. 19cm. Ok noveloj en diversaj stiloj. 6,00 gld.

Tempo fuĝas. Dudek kvin rakontoj el Monato, 1980-1994. Red. William Auld. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1995. 159p. ISBN 90-71205-62-2. 20cm. 25 rakontoj de 25 aŭtoroj, elektitaj el la 180 aperintaj en *Monato*. 33,90 gld.

Urno kun runoj. Meva Maron. Chapecó: Fonto, 1996. 96p. 21cm. "Viburno" kaj "Damaskaj prunoj": du poemoj de "klera, erudicia kaj sekreta" poetino, kies

"metaforan, bildan kaj lingvan sentemon apenaŭ eblas kompari kun iu alia" (S. Ŝtimec). 18,00 gld.

Vortkonsisto, vortfarado, vortanalizo, vortordo. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1996. 55p. ISBN 2-906134-35-X. 21cm. Kelkaj punktoj de teoria gramatiko, "ne necesa por uzadi la lingvon, sed utila por studi ĝian esencon" (la aŭtoro). 15,00 gld.

DIVERSAĴOJ

Kasedoj:

Neniu povas ŝanĝi la hieraŭon. Aira Kankkunen (1928). Laŭtleas Jadwiga Gibczyńska. Gotenburgo: A. Kankkunen, 1996. 55 min. Poemoj kun etoso kiu "odoras je severa norda naturo kaj susurantaj suomaj someroj" (Bertil Nilsson). 15,00 gld.

Pensi kaj ami esperante. Muzikas Julián Hernández, Héctor Jiménez, Martín Castro. Havano: Kuba Esperanto-Asocio, 1992. 55 min. 19 Esperantaj kantoj el Kubo, kun gitar-akompano. 18,00 gld.

Tena. Hejmo en Mezeŭropo. Spomenka Ŝtimec. Zagreb: La aŭtoro, 1996. 82+90+64 min. Mallonga romano: la morto de avino donas okazon rakonti pri la "privata Mezeŭropo" de ĉi tiu jarcento. Laŭtleas la aŭtorino. 30,00 gld.

Kompakta disko:

Povus esti simple. Persone. Stokholmo: Persone, 1996. 56 min. 13 rok-kantoj kun valora teksto. 39,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!




SENĜENAJ DIALOGOJ

UEA aĉetis la stokon de ĉi tiu fascina verko de Alberto Fernández pri la fundamentaj natur-sciencaj demandoj (materio, atomo, tempo, gravito, evoluo, genetiko, biosfero). 197p. Multaj ilustraĵoj. La prezo malaltiĝis de 29,70 al 18,00 gld. *Triona rabato* ekde 3 ekz.

NOVA ASTERIKS!

Asteriks ĉe la Olimpiaj Ludoj estas la nova plenkolora bildstria albumo en Esperanto. Tradukis: Jean-François Cousineau kaj Patrick Lagrange. 48p. Prezo: 19,80 gld. Ekde ĉi tiu volumo UEA fariĝis la ĉefa distribuanto de Asteriks-libroj kaj donas *trionan rabaton* ekde 3 ekz.





Propono: Kerna Esperanto, pluraj aplikoj



Ni celas korekti la aliajn kiuj antaŭjuĝas. Sed ni mem ofte konservas diversajn antaŭjuĝojn, en regionoj senrilataj al la kultura demokratio. Ek-

zemple, multaj el ni kredas ke la lerneje akiritaj lingvoj estas firma akiraĵo; ke la apero de enhavo-priskribaj recenzoj kaŭzas furoran vendiĝon de libroj; ke la nete praktikaj argumentoj konvinkas la mezan publikanon pri la valoro de interlingvo; ke la sisteme aŭ science aparatitaj studoj liveras efektivan fidindon kaj fidadon; ktp.

La subjektiva ekzisto de tiaj ĉi kredoj estas unu afero. Estas io alia ke ili ofte servas kiel neŭtraleska bazo por t.n. objektivaj diskutoj en aŭ pri Esperanto. Ilia persisto en tiu rolo interalie spegulas nian nevolon akcepti la mapon de la trafaj kaj maltrafoj de nia komuna entreprenaro.

En la pioniraj jaroj ni simple ne sciis kio prosperos al ni. Zamenhof proponis sciencan-inĝenieran argumentaron por la afero, sed lanĉis spiritan Aferon kun kaŝmajusklaj A. Lia movado aliris la sciencan eliton kaj renkontis rifuzon. La movado sub Privat provis la registarojn kaj precipe la Ligon de Nacioj. Tiu sektoro ne montriĝis entuziasma. Sub Lapenna, iom alia, uneske sukcesinta movado lanĉis la revuon *LMLP/LPLP** por instigi la lingvoplanadajn fakulojn ke ili flegu sian fakon. Ni esperis ke tio donos al niaj teoriaj argumentoj taŭgan arenon por demonstriĝi antaŭ la okuloj de sociolingvaj sciencistoj. Lingvoplanistoj ja rekonas la kontribuon de *LPLP*, sed tenas nin ekster siaj interesoĝoj. Tiu ĉi plilongigebla listo resumiĝas jene: niaj sukcesoj en la "materia" aŭ "praktika" sektoraro estas modestegaj.

Ni nin turnu al la spirita aŭ ideala sektoro, tiu de utopioj. Ne sekvis Zamenhofon viziuloj pretaj publike vizii la Forton Misteran en Esperantaj mondkongresoj. Niaj gvidantoj preferis heredi lian aserton ke ne temas pri "neefektivigebla utopio". Sed lian spiritan kernon de la Afero heredis, en alia formo, niaj Kalocsay kaj Miĥalski, niaj Auld kaj Ragnarsson, niaj Piĉ kaj Urbanová. Sur ĉi tiu arta kapitalo bazas sin interalie la raŭmista strebo al la senbatala konstruo de alternativa kulturo, kvankam ĝia retoriko apelacias al la sociologia scienco pri la praktiko.

Ĉu, meze de la ĝenerala babilado pri la devo kaj la nepovo vendi nian produktaĵon kaj simile, iuj el ni ne volus rimarki ke ĝuste la arta Esperanto sukcesis arte? Ke la plej intimaj lingvanoj bonege konas la trikojn kaj trukojn de niaj vortkonstruoj sen helpo de la oficiala lingvistiko? Ke la dometa industrio de la indiĝena gramatikado restas sufiĉa inspiro por samskalaj aŭtoregoj hodiaŭ?

Niaj praktikaj instruuloj ne trafis ĝis nun, kvankam ili sukcesis resti flosaj, kio estas ne malgranda atingo. Dank' al ili, niaj lernuloj arte, spektakle lernas, publike, pri ni ĉiuj, pri la mondo. Kiaterene kaj kiamaniere la lernado povas trafi? Gajni batalojn ne eblas per rimedoj tiaj. Kiel la dalitoj ("parioj") en Bharato, kiel la indiĝenaj popoloj ĉie, ni povas strategie malmiliti, persvadi la armile nevenkeblajn ĉefojn ke ili mem laŭgrade abdiku. Ŝanĝi la kulturon, kion faras ekzemple nigraj verkistinoj en Usono, tiel ke la ĝenerala publiko lernas iom post iom partopreni tian abdikadon.

Por ke ĉi tiu strategio funkciu, la praktika retoriko de nia movado devas ĉesi cenzuri ĉiun tekston kiu provas prezenti aŭ praktiki la strategion de aktiva malmilitado, de konscia utopiado, de senkaŝa teoriado kaj de parencaj iniciatoj.

La slogano de tia vizio por Esperanto povas esti ke ni flegas ne nepre *interlingvon*, sed poemaskan *Prilingvon*. Kiel la poemoj de nia memo pli intense videbligas la prozon de niaj komercadoj, tiel ankaŭ la intense arta Esperanto kapablas grandigi ĉies konscion pri la lingveco de niaj lingvoj.

El tia slogano povas flui eĉ praktikaj proponoj. Renkonte al la netrafoj en aliaj sektoroj, ni proponu, ekzemple, ke la Kerna Esperanto estu uzata vaste kiel instruilo kaj konsciigilo pri la lingvoj, ne nur en la geknabaj lernejoj, sed en ĉiuj medioj de la lingva konscio. La baza ideo kiun mi proponas prezenti al niaj publikoj en la formato de Kerna Esperanto, estas la afiksoj kaj ilia logiko. Uzanto de Kerna Esperanto en ekzemple Karnatlando (unu el la ŝtatoj de Bharato) laŭ tiu ĉi propono uzus la E-afiksojn kun karnataj radikoj por komenti pri la strukturo de la karnata, kaj ne hezitus en tiu laboro uzi la normalajn karnatajn afiksojn kun la konscio ke ili nun kunlaboras kiel liberaj iloj kun la afiksoj de Kerna Esperanto.

Tiu propono ne bezonas esti ligita kun la ideo de tutmonde uzata lingvo. Jen nur unu ekzemplo. Devas esti aliaj proponoj kiuj same nature fluas el la artoĉefiga re-vizio de Esperanto.

Alia aspekto de la malmilita strategio estas renkontigi niajn longe flegitajn ideojn kun tiuj de la literatura teoria mondo, kie multaj nove voĉohavaj kategorioj elmarĉandas siajn identecojn kaj iniciatojn en iuspeca kultura demokratio. Denove, por poviti efiĉe fari, ni bezonas klimaton en Esperantio kiu volonte apogas tian dialogon, kaj neniu subtriras nome de ia praktika imperativo.

Se el tiaj provoj sekvos disdialektiĝo de la Esperanta entreprenaro en relative sendependajn insulojn — jen iu Kerna Afiksaro en regionaj lingvoj, jen ia entuziasmo inter teoriuloj aliloke —, tio aspektos maltrafa nur al la nekorektitaj centristoj inter ni. Insuloj estas loĝeblaj se abunde fluas sur ili la gastamo. Eĉ la disdialektiĝo de E-o mi ne timas; ĝi jam okazis; egidis ĝin la Analiza Skolo, la Pironismo, la novaj alfabetoj, la praganoj k.s. Ĉu iu trovis ke inter tiuj dialektololimoj oni fakte ne interkompreniĝas?

Probal Daŝgupto (Bharato)

** La Monda Lingvo-Problemo/Language Problems and Language Planning; pri la historio de tiu revuo vd. dec. '94, p. 213.*



jam tradicia aranĝo de e-istoj de Jagodina, Niš, Leskovac kaj Vranje. (*InfoSEL, Jugoslavia Fervojisto*)

Mezlerneja lernolibro pri la germana en Serbio (1992) enhavas lecionon pri hobiaj, kiu kelk-linie mencias Esperanton, Germanan E-Junularon kaj la jaron de ĉi ties fondiĝo, 1953. (R. Petroviĉ)

komisiono estis starigita. Esperanto-Asocio de Sud-Afriko proponis al ĝi nomojn de eblaj kunlaborantoj, sed ricevis respondon laŭ kiu "neniuj esperantistoj estis elektitaj [en la 30-membran komisionon]". (*Bona Espero*)

• Brazilo: Premio por Mattos

La 27-an de aŭgusto akademiano Geraldo Mattos ricevis la 10-an Premion pri Scienco kaj Teknologio de Paranao, kiu konsistas el diplomo kaj 15-taga vojaĝo al Britio. Esperanto estis speciale menciita. (*Brazila E-isto*)

• Hispanio: Andaluzaj omaĝoj

Internacia seminario ĉe la Universitato de Murcio (17-19 okt.) pri la muzulmana Andaluzio estis fermita per Esperantlingva recitado, fare de Jesús de las Heras, de poemo de Ibn Arabi, aperinta en la atentinda monografio *Lirikaj perloj de Al-Andalus* de Antonio Marco Botella. (*Boletín*)

En junio 1997 eliros la 50-a numero de *Gazeto Andaluzia*, jarkvarona revuo de Andaluzia E-Unuiĝo. En ĝi aperos la rezultoj, kaj la plej bona novelo, de la jubilea konkurso kiun AEU anoncas por noveloj originale verkitaj en Esperanto, ampleksantaj maks. 6 paĝojn po 30 linioj. Premio: 10 000 pesetoj (ĉ. 130 gld.). La konkursojn (unu aŭ pli) en tri ekzempleroj, subskribitajn per pseŭdonimo, sendu antaŭ la 31-a de marto al J.F. Martín, Poŝtkesto 5184, ES-29080 Málaga, Hispanio. Aldonu viajn nomon kaj adreson en aparta fermita koverto. Pliaj informoj en la TTT-paĝaro <http://www.redestb.es/personal/delpozo>. (J.F. Martín)

• Italio-Mozambiko: Instrua misio

Silvia Collazuol, juna esperantistino el Torino, decidis definitive forlasi postenon ĉe grava firmao, por ekveturi al Mozambiko kaj volontuli en la instruata fako de tiea misio. Doktoriginte pri filozofio kun disertaĵo pri komunikado al specifaj sektoroj de la socio, ŝi trapasis triagradan E-ekzamenon kaj gajnis de Fondaĵo Marelli senpagan partoprenon en la UK de Seulo. (Interredaktore)

• Jugoslavio: Kvar-urba kulmino

La Fervojista E-Societo de Leskovac kunvenigis la 7-an kaj 8-an de septembro pli ol 110 esperantistojn el 9 urboj de Jugoslavio. Kulmino de la programo estis Kvarurba Renkontiĝo,

Grekio: Impona prezento

Atingis nin foto pri la publika prezento, la 24-an de aprilo en Ateno, de la 786-paĝa, greklingva enciklopedia verko de Kóstas G. Kiriákos, "Esperanto, la lingvo de la espero" (vd. "Laste aperis", nov., p. 195). Ĉeestis diversaj altranguloj, i.a. Nikolaos Zorogianidis, honora ĝenerala direktoro de la kulturministerio (unua vico, plej maldekstre).

• Kroatio: Arta ĝemeligiĝemo

Okaze de la 800-jara jubileo de la urbo Osijek, Kroata E-ista Unuiĝo (KEU), la lokaj E-societo kaj urba biblioteko kunorganizis dusemajnan ekspozicion el la desegnaĵoj de la juna zagreba e-isto Marijan Mirt, titolitaj "Al Osijek por la naskiĝtago". La organizantoj ŝatus prezenti la ekspozicion en aliaj urboj, precipe la ĝemelaj Vicenza (Italio), Ploesti (Rumanio), Pforzheim (Germanio) kaj Pécs (Hungario). Kontakto: KEU, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio; ☎+385/1/576-092; ✉Marija.Belosevic@public.srce.hr.

• Kubo: Post obstinaj baroj

Laŭ instigo de la ministerio de internaj aferoj, en Havano dudeko da malliberuloj eklernis Esperanton. La instruadon komencitan de Alicia Romay daŭrigas Justa Piñera. (*La Noktuo*)

• Sud-Afriko:

Pri multlingveco sen esperantistoj

Por trakti la problemon de multlingveco en la post-apartisma Sud-Afriko (vd. feb. '94, p. 26), oficiala

• Svedio: Nova Esperanto-domo?

Oni konsideras establi novan E-



Foto: Spross Sarafian

domon en Lesjöfors, per tre avantaĝa aĉeto ĉe la apuda municipo Filipstad, kiu favoras la projekton — same kiel Sveda Turista Societo. La nova domo, servonta kiel kursejo kaj tranoktejo por migrantoj, situas duonvoje inter Oslo kaj Stokholmo, ĉ. 70 km-ojn norde de Karlskoga, kies somerajn E-kursojn oni antaŭvidas transloki al Lesjöfors. (*Norvega Esperantisto, SLEA-Informilo*)

• Svislando:

Esperanto por albanoj

En Ĝenevo komencis funkcii Albana Popola Universitato, kiu instruas i.a. la lingvojn anglan, italan kaj Esperantan. (S. Walper)

**Se vi ne scias pri io,
ne kulpigu aliajn!**

→ Abonu al Eventoj!

*La sola sendependa,
internacia, movada gazeto!
Aperas dusemajne!*

pk. 87. HU-1675 Budapeŝt, Hungario

Fake



• Aidoso: Prevento per Esperanto

Okaze de la 1-a de decembro, monda tago por prevento de aidoso, estis lanĉita invito al e-istoj kunlaboremaj, aŭ jam aktivaj en ĉi-terenaj organizaĵoj, por anonci sin al: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio; ☎ +385/1/576-092; ✉ Marija.Belosevic@public.srce.hr. En la pasintaj du jaroj jam trideko da diversprofesiaj e-istoj (kuracistoj, flegistinoj, artistoj, edukistoj, studentoj) aliĝis al la Esperanta iniciato por aidosa prevento. Nacilingvaj informiloj estis tradukitaj al E-o kaj senditaj al landoj kie tiaj mankas. En *Kontakto* aperis serio de desegno-mesaĝoj pritemaj. Oni esperas dum iu venonta UK fondi veran fakan organizaĵon kaj, surbaze de la kolektitaj

informiloj, krei apartan E-informilon akcepteblan vaste tra la mondo, malgraŭ la tre malsamaj lokaj sintenoj al aidoso. Monhelpo eblas per la konto "aido-j" ĉe Flandra E-Ligo.

• Arto: Antverpena galerio

En la galerio Campo kaj Campo (Grote Steenweg 19-21, BE-2600 Antwerpen-Berchem, Belgio) eblas esti helpata en Esperanto, dank' al Yves Nevelsteen, estrarano de Flandra Esperantista Junulara Asocio, kiu laboras tie.

• Gramatiko: Konsultu rete

La komputile konsultebla *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG, vd. maj. '95, p. 87) nun troviĝas i.a. ĉe la Aŭstria Nacia Biblioteko: <http://www.onb.ac.at/pmeg1/pmeg.htm> (X-versio); <http://www.onb.ac.at/pmeg3/pmeg.htm> (Latino-3-versio). Kontaktulo: Herbert Mayer (mayer@grill.onb.ac.at), kiu ankaŭ zorgos pri la libra eldono de PMEG. Kritikojn kaj ideojn pri PMEG sendu al la aŭtoro, Bertil Wennergren (bw@e.kth.se).

• Informado:

Laŭ Selten, sekvos Azio

La ĉeflingva gazeto *Ekonom* publikigis en sia 38-a numero intervjuon kun prof. Reinhard Selten. Al la rimarkigo ke "internacia lingvo jam delonge fariĝis la angla", li respondis ke "tio povas rapide ŝanĝiĝi", pro pligraviĝo de Sud-Orienta Azio en la monda ekonomio. (*Starto*)

Senprecedencaĵo: La aŭtoritata *Revue de Politique Indépendante*, legata de universitataj profesoroj kaj politikistoj, publikigis en sia lasta numero (1996/3) kvarpaĝan pledon por Esperanto de Claude Piron. (*SAT-Amikaro*)

Times of Kashmir, semajngazeto en Pakistano, dediĉis la 7-an de sept. du el siaj kvar paĝoj al Esperanto, zorge de la Informa Centro de Pakistana E-Asocio.

Tuta paĝo pri Esperanto, kun intervjuoj de pluraj aktivuloj el Turku, aperis en la novembra numero de *Kelan Sanomat*, revuo kiun ricevas ĉiu pensiulo en Finnlando. (A. Mehtonen)

STR-ANGULO

Ermito pro milito

William Rowe naskiĝis en 1896, en malriĉa sed laborema terkultivistata familio, en Kornvalo. Post la eksplodo de la unua mondmilito, li devis en 1915 soldatiĝi en la brita armeo. Ĉar pro sia religia eduko li abomenis ĉian perforton, li plurfoje dizertis. Fine liaj gepatroj decidis helpi, kaŝante lin en speciale konstruita, sekreta ĉambro de sia farmdomo. Post la militfino Rowe plu restis en tiu kaŝejo, timante punon pro sia dizerto. Li eliradis nur nokte, por plenumi surkampajn laborojn. Per tio li dankis siajn gepatrojn, kiujn la najbaroj opiniis benitaj de feoj.

La patro de Rowe mortis iom antaŭ la fino de la dua mondmilito, kaj en 1953 la reĝino amnestiis la dizertintojn de ambaŭ militoj. Rowe

povis reaperi post preskaŭ 40 jaroj da kaŝvivo. Post la morto de sia patrino, li mastrumis la bienon sola, ŝajne ne malbone. Li tamen plu loĝis en sia sekretejo, kaj en la farmdomo regis malordo. Komencis

cirkuli klaĉoj pri la solulo,



kiun oni suspektis bonhava. En 1963 du ŝtelistoj kiuj konis lian famon,

Pascoe kaj Whitty, malfru-nokte frapis je lia pordo kaj mortigis lin pro ŝtela motivo. Tamen preskaŭ neniom da mono estis trovita, kaj la murdintojn oni baldaŭ arestis, kondamnis kaj pendumis.

Dum la enketo, la polico faris strangan malkovron. En la malpura kaj plenŝtopita kaŝĉambro de Rowe troviĝis amasoj da manskribitaj notoj en nekonata lingvo. Nur profesoro pri lingvistiko ĉe la proksima Universitato de Exeter povis ilin deĉifri, trovante i.a. indikojn pri la kaŝloko de la efektiva trezoreto de Rowe: sub la porkejo kaj sub arboj surkampaj troviĝis, enfositaj en vitraj ujoj, bankbiletoj kies nuntempa valoro egalus ĉ. 40 mil pundojn.

La nekonata lingvo estis, kiel vi eble jam suspektas, Esperanto.

Detale rakontas ĉi tiun veran historion *La Brita Esperantisto*, laŭ artikolo aperinta antaŭ ĉirkaŭ du jaroj en *The New Law Journal*. ★

• Instruado: ILEI aktivas eksteren

La nova ILEI-estrarano pri eksteraj aferoj, Raymond Wylleman, kolektis adresojn de poredukaj organizaĵoj eŭropaj, al kiuj li sendos informojn pri ILEI kun propono kunlabori. En oktobro Claude Gacond, Alain Favre kaj Mireille Grosjean, membroj de la svisa sekcio, reprezentis en Ĝenevo la instruistan ligan en Tutmonda Konferenco pri Edukado.

La sekretario de ILEI (M. Belošević, adreso ĉe "Aidoso") kunordigas sendadon de lerniloj al triamondaj landoj. Bv. sendi al ŝi malhaveblajn lernilojn aŭ liston pri ili, aŭ peti de ŝi adreson por rekta ekspedo. (M. Belošević)

Sur la bazo de 10-leciana kurso el Usono, pretiĝis retroŝta kurso de Esperanto en la hispana lingvo. Pliaj informoj: <strigo@entelchile.net>.

La 5-an internacian konkurson pri modela E-parolo honore al Ivo Lapenna en la lernojaro 1996/97 povas partopreni mezlernejanoj de 15 ĝis 19 jaroj. La aliĝintoj prezentos mallongan prozan tekston en sinsekvaj loka kaj regiona konkurso. Aliĝo ĉe propra instruisto: ĝis la 31-a de januaro. Ĵuriado: en aprilo. Prezento de la distingitoj: antaŭ la 15-a de majo. Ĉiuj instruistoj kies lernantoj deziras partopreni, informu ĝis la 3-a de februaro la organizanton: prof. Ivan Bekavac-Basić, Kušlanova 59, HR-10000 Zagreb, Kroatio.

• Komerco:

Gajnu botelon da sakeo

Kiel konsilanto ĉe la sake-firmao Izumibashi, e-isto Takao Ono (taon@tau.bekkoame.or.jp) planas la skeleton de ties TTT-paĝoj. La hejmpaĝo de Izumibashi klarigas pri la japana riz-drinkaĵo en deko da lingvoj, i.a. en Esperanto: <http://www.sphere.ad.jp/izumibashi/esp/esphome.html>. Helpon-tojn pri aldono de nova lingvo la firmao rekompencos per botelo da altklasa sakeo. (Novaĵoj Tamtamas, T. Ono)

• Kulturo: Interretaj interŝanĝoj

Kultura Fondaĵo Simpozio, kiu celas precipe la disvastigon de la filozofiaj konoj pere de Esperanto, starigas Internacian Servon de Kultura Interŝanĝo (ISKI) por peri kontakton inter e-istoj Interret-uzantaj kun similaj intereso: Aldrin Rodrigues Speck, Rua Huberto Rohden, 274, Campeche, BR-88064-000 Florianópolis SC Brazilo; aldrin@cce.ufsc.br. (M.A.F. Teixeira)

• Muziko: Spiritstatoj Esperantaj

"Fiero", "Kontemplado" kaj "Ĝojo": Esperantajn titolojn havas la tri movimentoj de *Spiritstatoj*, verko komponita de David Gaines por la blovinstrumentaro de Peabody-Konservatorio de Muziko de la urbo Baltimoro, kie ĝi tutmonde premieris la 17-an de aprilo antaŭ 300 aŭskultantoj. Gaines, prezidanto de Muzika E-Ligo kaj gajninto de la muzika premio Ahn Song-san de Belartaj Konkursoj en 1995, nun laboras pri sia "Simfonio n-ro 1 (Esperanto-Simfonio) por mezosoprana voĉo kaj granda orkestro", probable la unua Esperanta simfonio. La tekstoj de ties kvar movimentoj venas de Zamenhof, Marjorie Boulton, Penka Papazova kaj Gaines mem. Li estas fakdelegito pri muziko: 113 W. Mulberry Street, Baltimore MD 21201-3619, Usono; DaveGaines@aol.com. (ELNA Update, Ktp!, D. Gaines)

La kvinmembra punk-bando Piĉismo (Ukrainio) "stertore ĝemblekas" Esperantajn tekstojn de sia fondintokantisto Gleb Malcev, pri "divers-specaj nihilismoj, fekumoj kaj poeziaj abstraktaĵoj". Ili eldonis la kasedon *Subita merdo* kun naŭ kantoj, i.a. "Sama merdo", "Korespondi deziras" kaj "Foriro en merdon", sed aperas ankaŭ sur la kompaktdisko/kasedo *Vinilkosmo vol2*. (Helianto, ROK-Gazet')

• Nefumismo: Puraj Pulmoj

Tutmonda Asocio de E-istoj Nefumantaj havas novan adreson ĉe prezidantino Nora Moerbeek: Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE Beverswijk, Nederlando; ☎+31/251/231-079. Kontraŭ modesta jarkotizo (10 gld., kaj por B-landoj 7 gld.) TADEN eldonas la jarkvaronan bulleton *Puraj Pulmoj*.

• Skoltismo:

Kontakto por mondĵamboreo

La ĝenerala sekretario de Skolta Esperanto-Ligo, Hector Campos Grez (Casilla 231, Curico, Ĉilio; stigo@entelchile.net), kontaktis la lokan organizan komitaton de la 19-a Monda Skolta Ĵamboreo (decembro 1998–januaro 1999), por ebligi la parto-

prenon de SEL. La ĵamboreo, kiun partoprenos ĉ. 35 000 gejunuloj kaj estroj el 170 landoj, estos taŭga loko por diskonigi Esperanton inter la junularo, precipe latin-amerika.

• Sociala laboro: Asocio fondita

Post iniciato en Tampere, dum la Praga UK fondiĝis Asocio de Socialgelaborantoj (ASLE), kiu kunigas e-istojn aktivajn en la sociala kampo, ne nur profesiajn. Jarkotizo: 30 gld. Informas la prezidantino: Soile Lingman, Västeråsgatan 4, SE-11343 Stockholm, Svedio. (Esperanto aktuell)

• Turismo: Kun favora vento

29 esperantistoj el 7 landoj kunlaboris sur la dumasta klipero De Samenwerking ("La Kunlaboro"), kadre de la aranĝo Ejselmera Migra Aventuro (11-16 aŭg.), por veli laŭ la nederlandaj bordoj. Post komencaj malfaciloj pro nekonataj manipuloj kaj terminoj, la samlingvanaro sukcesis navigi de haveno al haveno en vetero favore suna kaj venta. (La Migranto)

Odette Scheidel esperantigis ampleksan dokumentaron pri la potfarista vilaĝo Betschdorf en Norda Elzaco (Francio). Petu ĝin ĉe: Musée de la Poterie, FR-67600 Betschdorf. (Franca E-isto)

• Vortaroj: Japana elektronike

Dank' al unujara laboro de dekelkaj japanaj esperantistoj, aperos en januaro 1997 kompleta versio de Dentan (japana mallongigo de "elektronika vorto-listo"), Esperanta-japana vortaro kun almenaŭ ĉiuj radikoj de PIV. La vorto-listo aki-reblas ĉe <http://www.bekkoame.or.jp/~taon/dentan/>. Pri la projekto skribu al ĝia estro Takao Ono (taon@tau.bekkoame.or.jp) aŭ kompilanto HIROTAKA Masaaki (peh00446@niftyserve.or.jp).

• ZEO-j: Zamenhof ĉe Mitterrand

En nova kulturcentro de Montendre (Francio), kiu ricevis la nomon de la mortinta prezidento François Mitterrand, unu el la salonoj oficiale nomiĝas Zamenhof. (Franca E-isto)



Ĉu vi jam rekotizis por 1997?

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de ĉi tiu revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. Antaŭdankon!

Carlo AGOSTINI (1906-1996) forpasis la 21-an de septembro en Bolonjo. Lia prezidado (1955-57) de la grupo Achille Tellini (kiun li postmilite kun-refondis) koincidis kun la plej alta nombro de E-kursoj ĉe la Bolonja Universitato, pluraj sub lia gvido. Li estis ĝenerala direktoro kaj poste senatano de Itala E-Instituto. Eminenta latinisto, Agostini defendis la ideon — i.a. en latinlingva letero “Ad Patres Conciliares” (1964), sendita al la 2-a Vatikana koncilio — ke Esperanto pli taŭgas ol la latina por roli kiel internacia lingvo.

Savo ARSENIĆ (1937-1996), esperantisto dum 43 jaroj, unu el la plej malnovaj en Banja Luka (Resp. Serba en Bosnio-Hercegovino), mortis la 16-an de oktobro en Beogrado.

Frans P. BOUW (1912-1996), delegito en Gemert (Nederlando), forpasis la 13-an de novembro.

Fernand BUECHER (1902-1996), kunfondinto de la grupo en Mulhouse (Francio), UEA-membro dum preskaŭ 50 jaroj kaj delegito en Didenheim 20 jarojn, mortis antaŭ nelonge.

Franca CONCINA (1932-1996), kassistino de Itala Unuiĝo de Katolikaj E-istoj, kunorganizanto de pluraj kongresoj, mortis la 16-an de oktobro en Torino.



Frans van Dooren

Frans van DOOREN (1905-1996), dumviva membro, forpasis antaŭ nelonge en Kontich (Belgio). Baldaŭ post esperantistiĝo en 1932, li fondis la belgian sektion de Internacia Proleta Esperantistaro kaj ties grupon en Antverpeno, gvidis la organizadon de la 2-a IPE-kongreso (1935, Antverpeno), kaj estis administranto de la IPE-organo *Sur Posteno* en 1937-38. Li sukcesis kunlaborigi en E-Komitato Intergruppa, sur neŭtrala bazo, divers-tendencajn E-organizojn de la Ant-

verpena regiono, kaj redaktis (1939-40) la organon de Flandra E-Ligo, *Flandra Esperantisto*.

Sub la pseŭdonimo F.V. Dorno li verkis humuraĵojn kaj komediojn: i.a. *La aventuroj de L.R.M. Stultulof la X-a* kaj *Levu la manojn!* (1939, reeldonitajn en 1977 kiel *Satiroj*), kiuj estis ludataj en Flandrio ankaŭ en traduko, kaj la unuaktan *Kia miksaĵo!* (1938, 1986). Ekde 1983 li pli konatiĝis pro romanoj kun inspektoro Ksaverio Kant en la ĉefrolo, verkitaj kun du amikoj sub la komuna pseŭdonimo Deck Dorval: *Jaĥto veturas for... kaj veturigas la morton* (1983), *Kazinski venas tro malfrue* (1987), *Nigra magio* (1988) kaj *Urd Hadda murdita!* (1990). *Kazinski...* aperis ankaŭ en tradukoj hungara (1990) kaj pola (1991), en po 30 mil ekzempleroj.

ETO Seiti (1903-1996), delegito pri ŝtataj financoj en Tokio, mortis antaŭ nelonge.

W.F. HARRIS (1903-1996), dumviva membro, iama delegito pri geologio kaj katolikismo, mortis lastatempe en Whatakae (Nov-Zelando).

HATUSIBA Takemi (1933-1996), konsiliano (1960-70) kaj estrarano (1975-90, 1993-94) de la landa asocio Japana E-Instituto, iama redaktoro de *La Revuo Orienta*, mortis la 8-an de oktobro.

Johann HAUPT (1913-1996), esperantisto ekde 1933, delegito de 30 jaroj — unu el la unuaj kaj malmultaj en la tiama GDR —, mortis la 31-an de oktobro en Neinstedt (Germanio).

ISIZAKI Bun'iti (1910-1996) forpasis la 21-an de septembro en Kumamoto, kies E-societon li prezidis. Li estis dumviva membro kaj estrarano (1991-1992) de Japana E-Instituto, delegito pri radio-amatorismo kaj rotario, membro de Societo Zamenhof kaj ofta donacanto al UEA.

Mervyn C. JACKSON (1939-1996) forpasis la 16-an de oktobro en Bracknell (Britio). Vicprezidanto de la brita sekcio de Kristana E-ista Ligo Internacia, li redaktis ties organon *Kristana Alvoko*. Li estis dumviva patrono de TEJO kaj 25 jarojn delegito pri meteorologio.

OFICIALA INFORMILO

NOVJORKA OFICEJO DE UEA
SUBTENANTOJ (minimуме \$25):
Aŭstralio: Owen Loneragan; Ralph Harry.
AMIKOJ (minimуме \$10): Aŭstralio: Stan J. Bruton; Tom Elliott; Teresa M. Metherall.

PATRONOJ DE TEJO 1996
Francio: Bruno Ferre; Jean-Marc Désert.

PATRONOJ DE TEJO 1997
Finnlando: Allan Mehtonen; Heta Kesälä; Jukka Pietiläinen; Akseli Kirsilä; Liisa Bergman; Liisi Oterma; Vuokko Tellervo Heinäsuo. Francio: Marc Savre. Germanio: Gisela Macioszek; Helmut Klünder; Ottmár Járeb. Japanio: Koichi Kai; Ivao Katô. Korea Resp.: d-ro LEE Chong-Yeong.

SOCIETO ZAMENHOF 1997
Aŭstralio: Jean A. Lehan; J.L.F. Somogyi; Keppel E. Enderby; Marjorie Ellyard; Ralph Harry; Stan J. Bruton; Teresa M. Metherall. Belgio: Elfriede Ernst; Marcel Delforge; Renée Herinckx-Ost. Ĉinio: S-ino WANG Xue. Finnlando: Heta Kesälä; Juho Pyykönen; Liisi Oter-

ma; Synnöve Mynttinen; Raita Pyhälä; Unto Seppälä. Francio: André Albault. Germanio: Harry Bily; Doris Freess; Elfriede Blasius; Martin Gründler; Gisela Macioszek; Heinz Schindler; Julie Winter; Marieta Moschner; Jean Prager. Japanio: Ivao Katô; Wilhelm Schmid; Yosikazu Takeuti; Hiroshi Takahasi. Korea Resp.: F-ino CHOI Yun-huy; Barry Savage. Norvegio: Kjell Peder Hoff. Portugalio: João Alberto Frazão de Faria. Usono: Catherine L. Schulze; Gigi Hara-bagi.

DONACOJ 1996 (gld.)
ĝis la 30-a de novembro
Fondaĵo Ameriko: Nederlando: F.v.d. Feen 100,00. Sumo ĉi-jara 4743,09. Biblioteka Fondaĵo: Nederlando: F. Zeiler 75,00. Sumo ĉi-jara 75,00. Fondaĵo Canuto: Germanio: J. Radam 12,32. Nederlando: F. Zeiler 100,00. Sumo ĉi-jara 11 270,34. Ĝenerala Kaso: Finnlando: R. Marttinen 17,85. Germanio: A. Knapp 89,54. Nederlando: I.M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00. Sumo ĉi-jara 8041,93.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KVARTO estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legaĵon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel ke
KVARTO estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1997 **KVARTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFA 1997

Aŭstralio	28 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	38 guldenoj
Aŭstrio	240 ŝilingoj	Germanio	34 markoj	Norvegio	140 kronoj
Belgio	700 frankoj	Hispanio	2100 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	29 guldenoj	Portugallio	2400 eskudoj
Britio	15 pundoj	Italio	31000 liroj	Svedio	150 kronoj
Danio	130 kronoj	Japanio	2600 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	100 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	22 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

ĈU VI SERĈAS KORESPONDAMIKON?

Sendu al **Koresponda Servo Mondskala**
jencajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo,
profesio, geedza stato, kiom da kores-
pondantoj dezirataj, en kiuj landoj kaj pri
kiuj temoj. Kunsendu du internaciajn respondkuponojn,
aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan
poŝtmarkon. **KSM** transdonos viajn informojn al alia(j)
korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj.
Vi ricevos rektan respondon. **KSM** estas servo de UEA.



Koresponda Servo Mondskala
B.P. 6
FR-55000 Longeville-en-Barrois
Francio

La filmo

SPUROJ DE LA AVO

(60,00 gld. ĉe la Libroservo de UEA)

montras lokojn ligitajn kun la
Zamenhof-biografio. Ĝia profito
estas destinita por la rekonstruo de
la naskiĝdomo en Bjalistoko.

Post *Mi vizitis grandan urbon*
la juna togolanda esperantisto
Gbeglo Koffi
denove ĝojigas
tiujn kiuj volas
scii pli pri la
vivo en afrika
lando.

De vilaĝo al ĉefurbo

Eldonis Fondajo Afriko de UEA. 32p. Prezo: 8,10
gld. (triona rabato ekde 3 ekz.). Mendu ĉe UEA.

Meznorvega Jubilea Renkontiĝo

Grupo Esperantista de Trondheim bonvenigas vin. De la
28-a de junio ĝis la 6-a de julio 1997 ni gvidos interesan
turisman arangon. Venu vidi la festantan miljaran urbon
kaj veturu kun ni por ĝui la sovaĝan naturon ĉe la maro
kaj en la montaro! Vidu: <http://www.kvatro.no/%7Eulf/Eo/esp/MJR.html>. Petu informojn retroste (knutty@
james.stud.ntnu.no), aŭ ĉe Ulf Stenhaug, A Solbergs v 32,
NO-7075 Trondheim, Norvegio.



Fondaĵo Canuto

**Multaj arde deziras membriĝi
en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via
donaco al Fondaĵo Canuto helpas
nin teni la kontaktojn kun tiuj
kiuj suferas pro transpagaj baroj.
Antaŭdankon pro via solidareco!**

LIBRO DE AMO

*"Leganto, se vi estas pruda
Kaj naŭzas vin la amo nuda ..."*

... tiam nepre ne aĉetu ĉi tiun faman majstroverkon
de la Esperanta erotika poezio, kiu malkovris al tiom
da geesperantistoj la misteron kaj belon de sekso.

Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos: Je la ŝildanenco de
"L'Akacio", 1969. 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran *Sekretaj sonetoj*
(1931) k.a. Prezo: 21,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

ARIA-Tradukservo

Svisa tradukoficejo
serĉas

sendependan tradukiston

kiu havas la nederlandan kiel
gepatran kaj lernejan lingvon
por elgermanigo de teknikaj
tekstoj al la nederlanda.

Interesuloj b.v. kontakti nin:

Tel./Fakso: +41 22 784 43 30
aŭ E-Poŝto:

101570.1355@compuserve.com

LA ONDO DE ESPERANTO

Dumonata soci-kultura revuo el Ruslando.
Fondita en 1909. Refondita en 1991.
28 gld. ĉe UEA aŭ egalvaloro ĉe pli ol 20 perantoj.

Internacia Rondo Esperantista PROSPERO

anoncas pri sia nova adreso:

Zinovi Kurolap, 1881 Steeles Avenue West, Suite 216,
North York, Ont., M3H 5Y4, Kanado.

☎ 1-416-6505277 (10am-9pm) ☎ 1-416-6507102 (24h)

✉ prospero@globalserve.net



En 1996 249 esperantistoj subtenis
la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de
mecenatoj de UEA. Vi ricevos leterojn de la
prezidanto de UEA, inviton al akcepto en UK
kaj donaceton kun la Jarlibro, kiu en
1996 estis bela SZ-globkrajono. La
kotizon (duoblo de MA por via
lando) vi povas pagi al via peranto
aŭ rekte al UEA.



Tuta biblioteko en unu libro!



El ĉiuj aperintaj volumoj en la Jubilea Kolekto
de UEA, tiu ĉi – la kvina – plej bone prezentas
la tutan lingvon, ĝiajn varion kaj fascinan.

Nova Esperanta Krestomatio

Redaktis William Auld.

509 p. Tole bindita kun kromkovrilo.

57,00 gld.; nur 38,00 gld. ekde 3 ekzempleroj.

Dua, pliampleksigita eldono de dudirekta vortaro
de grava afrika lingvo, fare de renoma lingvisto.

JAN KNAPPERT

Vortaro Esperanto-Suahila

Kamusi
Kiesperanto Kiswahili

Eldonis UEA, 1996. 16+158p.

Prezo: 18,00 gld. Triona rabato.



ANONCU EN JARLIBRO 1997!

En la Jarlibro de UEA via anonco pri Esperanto-
aranĝoj, libroj, gazetoj k.a. varoj atingos pli vastan
publikon ol en iu ajn alia Esperanto-eldonaĵo.
Pli ol 7000 aktivaj esperantistoj plurfoje vidos
vian reklamon, ĉar la Jarlibron oni konsultas
tra la tuta jaro.

Movada prezo Ekstermovada prezo

Kvarona paĝo	120 gld.	240 gld.
Duona paĝo	220 gld.	440 gld.
Tuta paĝo	400 gld.	800 gld.
Kovrilpaĝo	800 gld.	1600 gld.

Se vi varbas ekstermovadan reklamon, ni pagos
al vi 30% de la prezo kiel makleraĵon. Anonc-
mendiloj haveblas en Esperanto, la angla, franca,
germana kaj nederlanda. Limdato por la mendoj:
31-a de januaro 1997.

La Adelajda UK proksimiĝas...



...per
kanguruaj
saltoj!

Atende al Adelajdo, plibeligu viajn
korespondaĵojn per la glumarko
de la 82-a Universala Kongreso!

Diametro 36mm. Flavo kaj verdo sur blua fono.
Folio de 10 glumarkoj: 3,00 gld.
Triona rabato ekde triobla kvanto.